

# informilo **por** interlingvistoj



Eldonas Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)

17-a jaro (tria serio)

ISSN 1385-2191

n-ro 67 (4/2008)

## Enhavo

1	93-a UK en Roterdamo – sciencaj aranĝoj.....	2
1.1	Internacia Somera Universitato – 61-a sesio.....	2
1.2	Esperantologia Konferenco.....	2
1.3	Terminologia Forumo .....	3
1.3.1	Terminologio kaj lingvoplanado en Esperanto ( <i>Humphrey Tonkin</i> ) .....	3
1.3.2	Komentoj pri la prelego de Humphrey Tonkin ( <i>Wera kaj Detlev Blanke</i> ) .....	7
1.3.3	Kelkaj terminologiaj aktivaĵoj, lige, ekster kaj post TEC ( <i>Detlev Blanke</i> ) .....	8
1.4	Aliaj menciindaj aranĝoj .....	11
1.5	Premio Grabowski por du interlingvistoj.....	11
2	Aranĝoj pasintaj .....	12
2.1	Internacia Esperantista Ĵurnalista Kongreso en Vilno.....	12
2.2	ARKONES XXIX 2008 .....	13
2.3	KAEST '08 .....	14
2.4	18-a GIL-konferenco .....	14
2.5	The cost of English Spelling.....	15
3	Universitataj konferencoj .....	16
3.1	Interagado de etnaj kaj planitaj lingvoj en la kunteksto de la eŭropa integriĝo ( <i>Nina Danylyuk</i> ) .....	16
3.2	Esperanto kaj Interlingvistiko en Universitatoj – Konferenco en Amsterdamo	19
3.2.1	Komuniko .....	19
3.2.2	Enkonduka prelego ( <i>John Wells</i> ) .....	20
3.2.3	Komentoj ( <i>Detlev Blanke</i> ) .....	24
3.2.4	Konkludoj de la konferenco.....	25
3.3	Poznań: Interlingvistika Simpozio okaze de la 10-jariĝo de la Internaciaj Studoj de UAM ( <i>Ilona Koutny</i> ).....	28
3.4	En Zagrebo: Esperanto kaj kroata kultura identeco .....	29
4	Estontaj aranĝoj.....	30
4.1	Pri germana kaj romana lingvistikoj en Lesja Ukrainio .....	30
4.2	19-a konferenco de GIL.....	31
5	Interlingvistiko en la universitato de Zagrebo ( <i>Velimir Piškorec</i> ).....	31
6	Esperanto en universitatoj kaj institutoj de Ukrainio ( <i>Nina Danylyuk</i> ).....	34

# 1 93-a UK en Roterdamo – sciencaj aranĝoj

Kiel kutime en la kadro de Universala Kongreso, ĉi-foje la 93-a en Roterdamo (19-26 julio 2008) okazis abundo da fakaj kaj sciencaj aranĝoj. Pro spaco-manko ni povas raporti nur pri la plej gravaj.

## 1.1 Internacia Somera Universitato – 61-a sesio

La rektoro de la 61-a sesio estis prof. d-ro Wim Jansen, profesoro pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdam. Oni prezentis jenajn prelegojn:

<i>Hans-Michael Maitzen</i> (AT):	De la centro de la universo ĝis la spacoŝipo Tero: kiaj konsekvencoj por la tuthomara etiko?
<i>Bengt-Arne Wickström</i> (AT/DE):	Ekonomiko kaj lingvo
<i>John Wells</i> (GB):	La mirinda mondo de parolsonoj
<i>Keyhan Sayadpour</i> (IQ):	Denaskaj kor-malsanoj
<i>Jukka Pietiläinen</i> (FI):	Publika opinio pri utilaj lingvoj en Eŭropo
<i>Geoffrey Greatrex</i> (CA):	Prokopio de Cezareo, enigma historiisto de la epoko de Justiniano
<i>Maritza Gutiérrez González</i> (CU):	Kuba metodo de alfabetigo: sociaj sekvoj en Latinameriko kaj rolo de la amaskomunikiloj
<i>Mauro La Torre</i> (IT):	Kiel savi lingvo-variecon per interlingva edukado ?
<i>Probal Dasgupta</i> (IN):	Popola kaj malpopola posedo de la lingva riĉo: la duondormeco sub kogna lupeo
<i>Baldur Ragnarsson</i> (IS):	Verki poezion en Esperanto

La aktoj aperis:

*Vergara, José Antonio (2008, Red.): IKU 61. Internacia Kongresa Universitato. 61a sesio. Roterdamo, Nederlando 19-26 julio 2008. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 115 p.*

## 1.2 Esperantologia Konferenco

La esperantologia konferenco okazis la 24-an de julio 2008. Ĝin preparis kaj gvidis Detlev Blanke.

Realiĝis jena programo:

<i>Humphrey Tonkin</i> (US):	Malfermo
<i>Probal Daŝgupta</i> (IN):	Esperanto kiel laborilo en la interleksika komparado
<i>Nino Vessela</i> (IT):	Esperanto kompare kun la Suahila lingvo: kontrastlingvistikaj kaj socilingvistikaj aspektoj
<i>Věra Barandovská-Frank</i> (CZ/DE):	La korelativoj de Esperanto kompare al kelkaj lingvoj
<i>Detlev Blanke</i> (DE):	Vortkonstruaj modeloj en Esperanto kaj la germana
<i>Ziko van Dijk</i> (NL/DE):	Esperanto kaj malfortaj lingvoj en Vikipedio
<i>Zlatko Tišljarić</i> (SI):	Diakronia komparo de socia identeca funkcio de Esperanto kaj iama serbokroata lingvo

## 1.3 Terminologia Forumo

La Terminologian Forumon preparis kaj gvidis la membro de la Estraro de UEA por faka agado, José Antonio Vergara.

Kadre de la forumo okazis 7 prelegoj. Post enkondukaj vortoj de *José Antonio Vergara Humphrey Tonkin* prelegis pri la neceso de terminologia laboro. *Wera Blanke* prezentis skize la historion de terminologiaj agadoj. *Detlev Blanke* menciis diversajn aktivaĵojn dum la lastaj dek jaroj. *Marc Bavant* atentigis pri kelkaj problemoj ĉe la kreado de fakvortoj. *Ilona Koutny* prezentis la serion de etvortaroj eldonataj de ŝi. *Jan Werner* parolis pri TAKE kaj la de li gvidata bulteno „Konstruforumo“. *Yves Nevelsteen* prezentis la prikomputilan termino-kolekton Komputeko.net

Ni sekve prezentas la prelegojn de Humphrey Tonkin kaj Detlev Blanke.

### 1.3.1 Terminologio kaj lingvoplanado en Esperanto

*Humphrey Tonkin*

La fakon de lingvo-planado oni normale dividas en du partojn, foje en tri. Statusa planado estas tiu parto de planado, kiu rilatas al la situacio de la koncerna lingvo en ties kunteksto. Oni povas ŝanĝi la statuson de iu lingvo, ekzemple, per ŝanĝo de leĝoj aŭ reguloj, kiuj jen donas novajn rajtojn por la uzo de la lingvo jen forprenas ilin. Korpusa planado estas tiu parto de planado, kiu rilatas al la lingvo mem. Kiam antaŭ multaj jaroj oni decidis ne plu majuskligi substantivojn en la nederlanda lingvo, tiu estis ŝanĝo en la korpuso de la lingvo: oni ŝanĝis la formon, en tiu kazo, de la skriba lingvo. Foje oni aldonas al statusa kaj korpusa lingvoplanado trian fakon, kiun oni nomas akira planado – decidoj pri lingvoakiro en lernejoj, registaraj politikoj por instrui lingvon al novaj enmigrintoj, ktp.

En la Esperanto-movado oni povas difini la agadon por fortigi Esperanton en la ĉirkaŭa socio, aŭ kampanjojn por akceptigi Esperanton en internaciaj organizaĵoj kiel specojn de statusa planado. Tio, kion la Akademio faras en sia aprobo kaj malaprobo de lingvouzo, estas speco de korpusa planado. (Pri lingva planado kaj rilataj demandoj en Esperanto vidu la komentojn en mia libro *Lingvo kaj popolo* [2006].)

La terminologia agado apartenas ĉefe, kvankam ne ekskluzive, al la korpusa planado. Kiam la uzantoj de malgrandaj lingvoj klopodas modernigi aŭ ĝisdatigi siajn lingvojn, ili ofte uzas komitatojn kaj akademiojn por evoluigi la terminologion en difinita fako. Tion faris la israelanoj en la periodo tuj antaŭ kaj tuj post la fondiĝo de la respubliko; tion faras la islandanoj. Normale oni aplikas klarajn principojn al tiu agado. En la kazo de la israelanoj, oni serĉis unue en la Biblio kaj la aliaj sanktaj skriboj por trovi malnovhebreajn vortojn al kiuj eblus atribui novhebreajn signifojn. Manke de tio, oni turnis sin al la aliaj semidaj lingvoj, precipe al la araba. Nur post tio, oni transprenis tielnomatajn internaciajn vortojn. La celo evidente estis resti ĉe la spirito de la lingvo. En Islando oni emas unue serĉi malnovajn islandajn vortojn, kiujn oni povas adapti por esprimi novajn konceptojn, tiel ke la islanda konservu sian karakteron.

En la kazoj de Islando kaj Israelo, oni havas formalajn lingvajn instituciojn por elformuli novajn terminojn. Sed aliaj instancoj kaj institucioj povas ankaŭ roli. Rolas ekzemple la gazetaro, kiu, ne trovante difinitan koncepton ene de sia lingvo, alprenas korespondan vorton el alia lingvo, kie ĝi jam estas uzata. Influjaj sciencistoj aŭ sciencaj institucioj povas ludi similan rolon. Same teknikaj institucioj kaj ties fakuloj. Pro tio, ke la angla lingvo estas tiel influa en la internacia vivo, ofte la vortoj importitaj en aliajn lingvojn estas anglaj vortoj aŭ angle derivaj.

En la vere malgrandaj lingvoj – lingvoj de minoritatoj, lingvoj kiujn oni nun klopodas revivigi, lingvoj minacataj – la problemo de terminologio estas despli akuta ĉar evoluigo de terminologio ofte devas okazi en vakuo. Se mi estas islanda plumbisto, verŝajne mi dezirus scii kiel nomi difinitan formon de akvotubo, kiun mi uzas en mia ĉiutaga laboro. Do mia bezono nomi ion ekzistas jam antaŭ la kreo de ties nomo. En tiu senco, terminologia instanco estas fajrobrigado: ĝi devas interveni por solvi brulan demandon. Sed kio pri lingvo kun cent denaskaj parolantoj, inter kiuj ne ekzistas plumbisto? Kiel krei la terminojn por ke estonta plumbisto povu uzi la lingvon? Kaj eĉ se oni kreas la terminojn, kiel certigi, ke tiu estonta plumbisto efektive ilin lernu kaj apliku? Jen granda demando. Estas malfacile teni la atenton de fajrobrigadanoj kiam tute ne okazas incendioj.

Tio estas problemo, kiun ni frontas en Esperanto ĉiutage. Malgraŭ la disvastigeo de la lingvo, ĝi estas la reganta lingvo en tre malmultaj fakaj aŭ metiaj situacioj. Sed se ni volas plivastigi ĝian uzon, ni bezonas vortojn. Kiel krei ilin? Kaj kiel trovi aktive uzeblan nomon por speco de akvotubo kiam Esperanto-plumbisto estas, minimume dirite, maloftaj?

La fako lingvo-kultivado kaj la rilata fako lingvo-revivigo okupiĝas pri tiu ĉi temo. Temas pri tiuj branĉoj de la lingvoplanado, kiuj celas restarigi malfortajn lingvojn aŭ konservi ilian pozicion (pri lingvo-kultivado en Esperanto vidu *Lingvo kaj popolo*, supre cititan). Ambaŭ branĉoj interesiĝas ne nur pri la lingvo mem sed ankaŭ pri lingvaj institucioj, pri eldonado, pri fortigo de la literaturo, pri faciligo de ĉiutaga uzo (vidu ekzemple la verkojn de la granda usona socilingvisto Joshua Fishman pri tiu ĉi temo, precipe *Reversing Language Shift*, 1991, kaj *Can Threatened Languages Be Saved?* 2001). La terminologia demando ne estas nur korpusa demando: ĝi estas ankaŭ statusa demando. Eĉ se la terminoj estas kreitaj, ankoraŭ necesas doni al ili flugilojn enkondukante ilin en la lingvon. Kiel monbiletoj, ili akiras valoron ne per presiĝo sed per cirkulado.

Gravas, ke la terminologia laboro estu farata de homoj kompetentaj pri la lingvo koncerna kaj pri la fako al kiu ĝi aplikiĝas. Ĉe malgrandaj lingvoj, ofte regas la influo de intelektuloj, kiuj kredas, ke ili bone scipovas la koncernan lingvon sed efektive ne uzas ĝin en la ĉiutagaj interagoj kaj do ne ensorbis ĝian spiriton. En Esperanto, lingvo kies parolantoj ĉiuj estas minimume dulingvuloj, tia iom teoria aliro al terminologia laboro estas ofte renkontata, kaj nia faka literaturo abundas je ekzemploj de mortnaskitaj proponoj kovitaj en studoĉambroj. Gravas, ke la terminologoj ĝuu la respekton de la uzantoj de la lingvo, kaj samtempe de tiuj, kiuj eventuale uzos la terminojn kreitajn (tia respekto faciligas la statusan aspekton). Aliflanke, kono de metio ne nepre portas kun si la konon de la lingvo uzata por priskribi tiun metion – kaj, kontraste, la fakto, ke difinita termino jam inventita ne envenis la normalan lingvouzadon ne estas en si mem signo, ke ĝi ne estas bona. Ja unu el niaj celoj devas esti trovi kaj eventuale renovigi la terminarojn kaj unuopajn terminojn jam kreitajn kaj dise ekzistantajn (vidu la bibliografion ĉe <http://uea.org/dokumentoj/bib/index.html>).

En tiu senco, korpusa agado aplikiĝas nur kiam statusa agado (la disvastigo de jam ekzistantaj terminoj) ne funkcias.

La praktiko montras, ke ju pli forte la kreado de la terminoj estas bazita sur simplaj principoj, kiuj ebligas la senperan kreon de terminoj per apliko de kelkaj fundamentaj reguloj, despli bone. Tiu estas unu el la karakterizoj de Esperanto dekomence: la Zamenhofa fundamento eksplice proponas vortkunmetajn kaj vortokreajn regulojn kun tiu celo. Kunmetitaj formoj de ekzistantaj vortoj povas solvi multajn terminologiajn problemojn. Aliflanke, estas foje pli bone krei tute novan terminon ol semantike troŝarĝi ekzistantajn vortojn, ĉar tia ŝarĝo povas tro facile ŝanĝi kaj limigi la signifon. Simpla ekzemplo el niaj kongresoj estas la vorto “aliĝilo,” kiu havas tute

specifan signifon (plenigenda registroformularo kutime por kongresoj, konferencoj kaj organizaĵoj) – malgraŭ tio, ke teorie aliĝilo povus esti kiu ajn ilo por alproksimiĝi al io. Alia ekzemplo estas “estraro,” kiu ne plu estas kiu ajn aro da estroj sed tute specife aludas al speco de gvida komitato. Do, evoluigo de terminoj postulas ekvilibron inter resemantigo kaj neologismo.

Jam en 2001, la Terminologia Esperanto-Centro listigis, sub gvido de Wera Blanke, bazajn principojn por kreo de terminoj, kiujn indas zorge atenti<sup>1</sup>. Ili estis bazitaj siavice sur zorgan studadon de la terminologia scienco, precipe en la verkoj de Eugen Wüster, kiu estis samtempe granda terminologo kaj esperantisto, kaj ili ankaŭ fontis el la laboro de Wera Blanke mem (vidu ekzemple la serion de ŝiaj artikoloj ĉe <http://esperanto.net/tec>). Sed la terminologiaj principoj de 2001 rilatas plejparte al korpusaj aspektoj de la demando, ne tiom al statusaj kaj akiraj. Samo validas ĉe Heidi Suonuuti, kies *Terminologia gvidilo* (1997), tradukita en Esperanton de Sabine Fiedler en 1998 kaj redaktita de Wera Blanke, utile gvidas nin tra la konsideroj, kiuj rilatas al la ISO-normoj por terminologio. (Vidu ankaŭ la verkon *Terminologiaj konsideroj* de Jan Werner [2004], kiu, kvankam esence korpusa, tenas vivan atenton al la socia kunteksto de la terminologia planado.)

En tiuj ĉi kazoj – la statusaj kaj akiraj kazoj – granda ŝarĝo falas sur la ŝultrojn de la uzantoj de la lingvo, kiuj devas atente utiligi la evoluigitajn normojn kaj rezisti la tenton malkonsenti kun la terminologoj. En Esperanto, kiu estas konstante uzata por priskribi mondon multe pli vastan ol la efektiva mondo en kiu Esperanto estas ĉiutage uzata, tiu ŝarĝo falas eksterproportie sur la opiniinformantojn – la gazetaro, la verkistoj, la radio, la publikaj parolantoj. Ili devas koni kaj daŭre plikoni la lingvon. En tiu senco, eĉ se ni uzas multan energion je la evoluigo de la korpuso de la lingvo, kaj eĉ se ni agadas per statusa planado por disvastigi terminojn kaj meti ilin en cirkulon, la akira planado gravas: homoj devas koni la terminojn. Ĉu do necesas emfazi, ke neniam oni finlernas Esperanton? Oni povus objeti, ke tio validas por ĉiuj lingvoj: ni daŭre lernas novajn esprimojn. Sed Esperanto estas dua lingvo kaj sekve postulas specialan atenton. Same kiel kuracistoj aŭ advokatoj, ankaŭ esperantistoj bezonas konstantan ĝisdatigon. Ĉu ni sufiĉe uzas niajn kongresojn por ebligi pluan lernadon? Certe ne. Kial la Akademio ne lanĉu iun programon de lingvolernado kaj lingvoesplorado je plej alta nivelo – kun kursoj kaj prelegoj dumkongresaj, kaj kun evoluigo de lerniloj por bone informitaj esperantistoj?

Kaj gravas, ke ni legu niajn verkistojn, kaj ke ili verku verkojn lingve respondecajn, ĉar la verkistoj plivastigas la lingvon kaj elprovas ĝin en novaj sferoj. La Esperanto-literaturo gravas ne ĉar ĝi amuzas la libroamantojn sed ĉar ĝi respegulas la vivantan lingvon kaj ankaŭ samtempe projekcias la lingvon sur spertojn akiritajn ekster ĝia medio. La librokulturo de Esperanto estas esenca elemento en la apliko kaj funkciigo de la lingvo.

Samtempe, ni rigardu ekster nia komuna lingvo. Ni esperantistoj ne laboras en vakuo, aŭ ne devus labori en vakuo, ĉar multaj homoj iris kaj iradas la saman vojon de evoluigo de terminologio. Ni, kiuj reprezentas en niaj rondoj grandegan nombron de lingvoj, devus multe pli sisteme lerni el la sperto de uzantoj de aliaj lingvoj. Kion oni faras por evoluigi la vortprovizon de la eŭska? Kion oni faras por tion atingi en la ksosa aŭ la zulua? Kion oni faras en la irlanda, aŭ la malta, aŭ la estona? Fundamenta parto de la terminologia laboro devas esti lernado per la sperto de aliaj.

Alia fundamenta parto de la terminologia laboro devas esti starigo de la ĝustaj institucioj por fari tiun laboron. La Akademio de Esperanto estus la natura organo por tion atingi, sed ĝi konsistas el

---

<sup>1</sup> Al ni ne estas klare, kiun materialon HT celas (DB, WB).

homoj elektitaj ne pro sia organiza kapablo sed kiel kapabluloj pri lingvoj. Kiun rolon do la Akademio ludu, kaj kiun rolon prenu la aktivuloj? Kaj se ni starigas apartajn instancojn por superrigardi la laboron, kiu organizos kaj daŭrigos ilin? Tiun problemon ni jam plurfoje havis en pasinteco, interalie kunlige kun la Terminologia Esperanto-Centro (vidu la tiuteman artikolon de Wera Blanke ĉe [esperanto.net/tec](http://esperanto.net/tec)).

Ni tamen havas kelkajn novajn avantaĝojn, precipe Interreton, kiu ebligas diskutadon kaj kompiladon multe pli facilajn ol antaŭe. Ni ankaŭ havas kelkajn sukcesajn modelojn, kie kruciĝas lingva kompetento kaj lingva bezono. Mi pensas ekzemple pri Komputeko, la prikomputila terminokolekto farita ĉefe de Yves Nevelsteen – simpla kaj populara produkto de la laboro de kolektivo kiu samtempe kompetentas kaj pri la metio kaj pri la lingvo ([komputeko.net](http://komputeko.net)). Unu vojo al kreado de terminologio ne estas starigi rondon por evoluigi la koncernan terminologion, sed starigi rondon por faka diskutado – kies flankprodukto estas terminologio. Tie kruciĝas la faka laboro por Esperanto kaj la terminologia. Kaj, en la senco, ke oni starigas novajn manierojn utiligi la lingvon, oni unuigas la korpusan planadon kun la statusa planado.

Do, kion fari praktike? Mi menciuj la jenajn aferojn, kiuj kvazaŭ ĉirkaŭas la efektivan kreon de terminoj:

1. Ekscii kion oni faras pri terminologio en aliaj lingvoj, precipe la malgrandaj lingvoj kun certaj similecoj al Esperanto, interalie en la limigita utiligo en diversaj fakoj.
2. Evoluigi per ĉiuj eblaj rimedoj la fakan utiligon de la lingvo.
3. Inventari la terminarojn kaj unuopajn terminojn, kiuj jam ekzistas, interalie en vortaroj aŭ fakaj verkoj, aŭ aparte kompilitaj fakaj terminaroj. Do, ne rekrei tion kio jam ekzistas.
4. Starigi principojn por la evoluigo de terminologio en Esperanto, kaj plidetaligi kaj konigi la jam ekzistantajn.
5. Starigi okazojn por plibonigi la lingvan scion de la plej kompetentaj kaj mezkompetentaj esperantistoj, inkluzive kursojn.
6. Kunlabori kun la Akademio, sed ne postuli de ĝi pli ol ĝi kapablas liveri.
7. Stimuli la literaturan uzadon de la lingvo, ĉar verkistoj ofte verkas pri spertoj ekster la normala uzosfero de Esperanto.
8. Fine, sed iasence tutunue, krei bonan kaj kiel eble plej universalan planon por la lingvokultivado en Esperanto, ĉar ĉio, kion mi menciis, estas parto de unu granda lingva plano. Se Esperanto estas planlingvo, ni havas respondecon ĝin pluplani.

Terminologia laboro en Esperanto tuŝas ĉiujn tri branĉojn de la lingvoplanado: la korpusan en la kreado de terminoj, la statusan en la disvastigo kaj akceptigo de tiuj terminoj, kaj la akiran en la lernado kaj instruado de la terminoj fare de tiuj kiuj poste uzos kaj cirkuligos ilin.

## 1.3.2 Kelkaj komentoj pri la prelego de Humphrey Tonkin

*Wera kaj Detlev Blanke*

La teksto, kiun Humphrey Tonkin (HT) prezentis, donas multajn valorajn instigojn por la kreado de faka leksiko, kaj ĝi prave emfazas la gravecon de akira planado kiel trian kolonon apud tiu de statusa kaj korpusa planadoj en la fortigenda lingvoplanado. Konsiderante la ĝisnunajn spertojn pri la temo, ni volas mencii kelkajn problemojn:

1 Ŝajnas al ni, ke la faka agado, la faka apliko de Esperanto entute, ne estas taksata sufiĉe grava kaj en la lingvo-komunumo kaj en ties gvidantaroj. Abundas poemoj, malabundas faktekstoj. La fakaj asocioj havas principe similajn problemojn de administrado, publikigado, terminologia agado. Provoj kunordigi la fakan agadon, stimuli kaj helpi ĉirilate, ĝis nun estis relative sensukcesaj, almenaŭ nesufiĉaj.

2 Pri la rolo de lingvo-planado en planlingvo, aŭ – pli vaste – multe pli konscia kaj sistema lingvo-kulturo, ne regas unueca sinteno, nek en la lingvokomunumo mem nek en ĝiaj gvidaj institucioj. La ĉirilata provo en 1996 diskutigi tiajn problemojn en formo de kolokvo ne vere alportis rezultojn (vidu sub 1.3.3 Blanke/McCoy/Buller 1999).

3 Jes, oni ne tro postulu de la Akademio de Esperanto. Sed eble iam utilis, diskutigi la Akademion pri la temo “Defioj de lingvoplanado kaj lingvo-kulturo en Esperanto kaj la rolo de AdE”. La nuna rolo de nia lingvo-institucio al ni ŝajnas multe tro pasiva, por ne diri nesufiĉa. Tio ne signifas, ke ni ne rimarkis en la lastaj jaroj aperon de kelkaj aktivaĵoj, litigitaj ĝenerale al tamen nur unuopaj personoj. Ni jam kelkfoje levis la demandon, ĉu ne estus utile revui la ĉefajn tipojn de lingvo-institucioj, kiuj ekzistas tra la mondo, kaj jes lerni de ilia agado, aparte se temas pri malgrandaj lingvoj, kiel HT prave sugestas.

Ke siatempe fondiĝis la Terminologia Esperanto-Centro (TEC) unuavice ŝuldiĝis al la ekkono, ke AdE ne vere volas aŭ povas okupiĝi pri tiuj aferoj, kiuj laŭ TEC estas esencaj: konatiĝi pri la principoj de termino-farado, kiel ili estas akceptataj de ISO kaj aplikigi ilin.

4 Alordigante terminologian agadon „ĉefe ... al la korpusa planado“ oni ne sufiĉe klare evitas la danĝeron de bedaŭrinde tre disvastigita miskompreno.

Ja granda plimulto de la diversfakaj specialistoj ankoraŭ nun opinias, ke „terminologia agado“ signifas unuavice kreadon de (fakaj) vortoj. Tamen, necesas substreki, ke tiu kreado (aŭ elekto, konfirmo, malkonsilado) devus esti nur la *lasta paŝo* post multe pli komplika kaj respondeplena preparlaboro. Pri tiu preparlaboro ekzistas aparta scienco, nomata „TERMINOLOGIO“, en kies ellaborado dum la pasinta jarcento pioniris esperantologoj/ interlingvistoj. La rezultoj estas disponeblaj.

Sed la miskompreno rezistas, unu post la alia aperas „terminaroj“, (elektronikaj aŭ surpaperaj), kiuj envere estas nur fakaj vortlistoj, diligente kompilitaj el aliaj vortlistoj, parte novkreitaj, en bonaj okazoj diskutitaj kun samfakuloj – sed malofte provizitaj per klarigoj, por ne paroli pri baziĝo sur sisteme difinitaj nocioj.

Dum temas pri la de HT menciita islanda plumbisto, kiu volas nacilingve nomi novan akvotubon, eble sufiĉas „unue serĉi malnovajn islandajn vortojn“ – sed se tiu plumbisto hazarde volos diskuti kun diverslingvaj samfakuloj pri akvotubaj aferoj, li bezonos fidindan plurlingvan fakvortaron – kaj tia povas nur estiĝi surbaze de strikta, unusenca, delimitiga difinado de akvotuba nociaro, por garantii, ke la diversnaciaj plumbistoj parolu pri la sama afero. Alikaze ili eble kaŭzos inundon de konfuziĝoj.

5 Lige al punkto 4 rezistas alia grava miskompreno rilate al la taskoj kaj celoj de TEC. Oni ofte supozas, ke ĝi devus okupiĝi pri la faka agado, aparte pri la kreado de terminoj. Tio ne estis la celo de TEC. La diversaspekta fakaplika agado kaj lige al ĝi, la kreado de fakaj terminoj, estas kaj restas la tasko de la fakaj asocioj, de la kompetentaj fakuloj. Por ke ili tion faru sur bona nivelo TEC volis helpi, klerigi, stimuli spertinterŝangon, atentigi pri adekvataj publikigaĵoj, ligi la esperantan terminologian agadon al la tutmondaj spertoj, kiuj ĉefe kuniĝas en Infoterm, la Internacia Terminologia Informcentro en Vieno, kun kiu TEC siatempe ligis bonegajn rilatojn.

6 Kiel konate estas tre malfacile vendi esperantan literaturon, eĉ beletron. Sed apenaŭ vendiĝas faka literaturo. Eventuale oni devus funde rekonsideri la ĉi-rilatan agadon. Kial ni ne havu bone redaktitajn kaj plaĉe publikigitajn antologiojn de popularsciencaj tekstoj? Jam elekto de tekstoj de la 61 sesioj de IKU donus kelkajn kompendiojn.

7 La 8 punktoj, kiujn HT prezentas, al ni tre plaĉas. Tamen, por eviti miskomprenon, jen du rimarkoj:

Lige al 4: La principojn oni ne devas starigi. Ili ekzistas. Jes, ja necesas disvastigi kaj akceptigi ilin, eble ankaŭ prezenti en kursoj, kiel oni apliku ilin ktp. Sed aparte gravas starigi principojn por la tuta faka agado, en kiu la terminologia estu grava parto.

Lige al 6: Do, kion postuli aŭ ne postuli de la Akademio? Ĉu ne fariĝas tempo, ĝisfunde rekonsideri la rolon de nia lingva institucio?

Ŝajnas al ni, ke HT donis kelkajn gravajn impulsojn por ĝuste fari tion.

### 1.3.3 Kelkaj terminologiaj aktivaĵoj, lige, ekster kaj post TEC

*Detlev Blanke*

Ĉar pro diversaj cirkonstancoj la Terminologia Esperanto-Centro (TEC) fakte ĉesis funkcii en 1992 (vidu W. Blanke 1999), mi volas nur skize resumi kelkajn aktivaĵojn terminologiajn, kiuj tamen pluokazis. Pro tio eblas konkludi, ke la klopodoj pri TEC ja donis certajn impulsojn kaj sekvojn, kiuj plu efikas. Evidente ekzistas certa bezono pri sistema terminologia agado, kvankam nur malmultaj homoj pretas sin daŭre engaĝi. Al ili apartenas la ĉefa inĝeniero kaj terminologo Jan Werner, kiu ne nur publikigas teoriajn eseojn pri terminologiaj problemoj, sed ankaŭ verkis kelkajn fakvortarojn (i.a. pri matematiko, betono kaj betonistaj laboroj) kaj aktivas organize (oferto de terminologia kurso en la reto, eldono de la bulteno „Konstruforumo“ ekde 2005, ks.). La ĉefa problemdo ne estas manko de scio, kion kaj kiel fari, sed la preteco de kapablaj homoj sisteme, persiste kaj fidinde labori.

#### (1) La Terminologiaj Forumoj<sup>2</sup>

Dum la 70-a UK 1985 en Aŭgsburgo la Komitato de UEA principe decidis fondi TEC kaj proponis laŭajn preparlaborojn. Dum la 72 UK en Varsovio la Komitato oficiale fondis TEC. Post tio eblas mencii diversajn laborojn, eldonaĵojn, prelegojn k.s. (vidu W. Blanke 1999). Por informi pri terminologiaj problemoj, aktivadoj k.s. sed ankaŭ por gajni aktivulojn por TEC, dum kelkaj kongresoj okazis t.n. Terminologiaj Forumoj. Ili okazis kadre de jenaj kongresoj kaj – kun kelkaj esceptoj – estis organizitaj de Wera kaj Detlev Blanke, resp. de unu el ili:

1985 - Pekino, 1987 – Varsovio, 1988 – Roterdamo, 1989 – Brajtono, 1991 – Bergeno, 1992 – Vieno, 1993 – Valencio. Post interrompo reaperis la forumoj: 1999 – Berlino, 2001 – Zagrebo,

---

<sup>2</sup> Vidu la programinformojn en la koncernaj kongreslibroj, raportoj en la eldonoj de la revuo „Esperanto“ kaj en „Informilo por Interlingvistoj“.



2003 – Gotenburgo, 2004 – Pekino (organizis Petro Chrdle kaj Marc Mavant), 2005 – Vilno, 2006 – Florenco (organizis Marc Bavant) kaj 2008 – Roterdamo (organizis José Antonio Vergara).

## (2) Terminologiaj problemoj kadre de internaciaj kaj naciaj konferencoj

Antaŭ 1990 en Ĉeĥoslovakio okazis serio de 7 konferencoj, nome de 1978 ĝis 1989, sub la kadra temo „Seminario Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko“ (SAEST, 4 en Ĉeĥio kaj 3 en Slovakio). Aperis la aktoj de tiu serio. Tiun tradicion reprenis Petro Chrdle kaj okazigis unue en Praha kaj poste en Dobřichovice ĉe Praha (sidejo de la eldonejo kaj organiza entrepreno KAVA-PECH) ĝis 2008 entute 6 konferencojn sub la siglo KAEST, t.e. Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (1998, 2000, 2002, 2004, 2006, kaj 2008). Dum ili multaj prelegoj traktis terminologiajn aŭ terminologi-organizajn aspektojn. La aktoj de ĉiuj konferencoj aperis (tiu por 2008 nun estas presata). Ankaŭ menciindas la kolokvo de la Akademio de Esperanto, kiu 1994 en Praha okazis sub la kadra temo „La stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto“ (vidu IpI Nr. 10-11). Ankaŭ ĝi traktis terminologiajn problemojn. La aktoj aperis. En Germanio “Gesellschaft für Interlinguistik“ (GIL, Societo pri interlingvistiko) kadre de siaj jaraj konferencoj dum 8 de la ĝis nun 18 traktis terminologiajn problemojn. La tekstoj aperis en la koncernaj kongresaktoj (8 volumoj), pri kies enhavo informas IntI kaj IpI.<sup>3</sup>

## (3) Rilatoj al neesperantistaj terminologiaj instancoj

Dum sia funkciado TEC povis starigi gravajn rilatojn al la ĉefa internacia informcentro pri terminologiaj aferoj, kiujn fondis Eugen Wüster 1971 en Vieno. Tiuj kontaktoj ekzistas ĝis hodiaŭ sur persona bazo. UEA daŭre estas membro de la Terminologia Komitato 37 (“Terminologio – Principoj kaj kunordigado”), TC 37 de ISO kaj ricevas la koncernajn materialojn kaj invitojn je partopreno. Foje reprezentantoj de UEA partoprenis la kunsidojn de TC 37. Infoterm ankaŭ ofertis senpagan partoprenon de junaj homoj en terminologiaj trejnseminarioj. Entute kvin personoj utiligis la eblecon.

Kvankam TEC ne aktivadis kiel dezirite, tamen la kulmino estis ĝia partopreno en la jubilea konferenco omaĝe al la 100-jariĝo de Eugen Wüster, 1998 en Vieno. En la konferenco “ProCom” unu el la 6 ĉefaj prelegoj temis pri la rilatoj inter planlingvoj kaj terminologio-scienco. Krome aktivis aparta sekcio “Planlingvoj kaj terminologia agado”, en kies kadro estis prezentitaj 7 prelegoj. La ĉefa prelego (en la angla) kaj la laborgrupaj prelegoj aperis en la germana (kp. Blanke 2003; Oeser/Galinski 1998).

Kun neesperantistaj fakaj instancoj la kunlaboro aparte funkcias flanke de la forstistoj, kies laboro pri la multlingva fakvortaro Lexicon Silvestre laŭ ISO-principoj vekis atenton kaj rekonon de IUFRE (Internacia Unuiĝo de Forstsciencaj Institucioj). Krome menciindas la fervojistoj kun sia multlingva fervoja fakvortaro, kiuj kunlaboras kun la terminologia komisiono de UIC (Internacia Unio de Fervojoj).

Aparta vojo, informi neesperantistajn fakulojn kun grava influo en la scienca faklingva medio foje povas esti la verkado de magistra disertacio. Tion vere brile faris Sandra Schweder (Schweder 1999), kiu traktis la temon “Evoluo kaj akcepto de teknikaj terminologioj en la planlingvo Esperanto” en magistra disertaĵo en la Universitato de Hildesheim, sub la prizorgo de tre grava profesoro kun granda influo en la internacia terminologia medio. Lia simpatio por Esperanto kreskis ankaŭ per tiu laboraĵo. Bedaŭrinde al la verkintino mankis la emo prezenti la rezultojn de sia esploro, almenaŭ skize, ankaŭ en Esperanto.

---

<sup>3</sup> Ankaŭ vidu <http://www.interlinguistik-gil.de/beihefte.html>.

#### (4) Fakvortaroj

Laŭ la superrigardo, kiun ellaboris Ĵeromo Vaŝe de 1993 – 2007<sup>4</sup> aperis 88 vortaroj por 79 fakoj, kun 34 traduklingvoj. La ĉefaj traduklingvoj estas la angla, germana, franca. Temas i.a. pri jenaj fakoj: astronomio, biologio (botaniko, ornitologio), ekonomio (komerco, asekuro, profesioj), geografio (loknomoj), komputiko, konstrutekniko, matematiko, medicino, politiko (Eŭropa Unio, sindikatoj), sporto (aŭtosporto, ludoj), trafiko (transporto, aviado, fervojoj).

De entute 88 vortaroj nur 45 troviĝas en la reto. Nur 24 havas difinojn. Nur en la reto ekz. ekzistas jenaj vortaroj: astronomio (kolektivo, 2002), kuirvortaro (Vaŝe, 2007), tradukado (Haveman, 2003).

En la reto ankaŭ troviĝas la “Terminoteko” de Bernhard Pabst (1992-1996, 14 kajeroj) kune kun partoj de la Pekoteko de Eichholz.<sup>5</sup>

Gravaj modelaj vortaroj estas jenaj:

- La forstfaka Lexicon Silvestre (difinoj en Esperanto kaj 12 aliaj lingvoj, kelkaj partoj kun 6000 terminoj). La ĉefredaktoro Karl-Hermann Simon ricevis la distingon de la “Internacia Unuiĝo de Forstsciencaj Institucioj” (IUFRE).
- La multlingva “Fervoja Terminaro” surbaze de la terminologia banko Rail-Lex kun ĉ. 10 000 terminoj. En 2002 ekzistis vortaroj Esperanto-X kaj X-Esperanto por 19 lingvoj.
- La Komputika leksikono de Sergej Pokrovskij (1995)
- La Terminaro de betono kaj betonistaj laboroj de Jan Werner kaj kolektivo (2002).
- La matematika vortaro kaj oklingva leksikono de Marc Bavant (2003)
- La dekklingva Manlibro pri politiko de Stefan Maul (1994).

Ankaŭ menciindas la Terminaro de Feloj de Lubomír Středa (1998), kiu baziĝas sur ĉeĥa normo.

#### (5) Informado kaj materialoj pri terminologia laboro

La literaturo de ĉi-tiu superigardo donas kelkajn gravajn titolojn. Krom tio oni trovas multajn materialojn kaj informojn en la kajeroj de “Informilo por Interlingvistoj” (IpI) kaj en la germana bulteno de GIL “Interlinguistische Informationen” (IntI). En IpI kaj IntI ankaŭ troviĝas ĉiuj informoj menciitaj en tiu eseo, krome la enhavtabeloj de la menciitaj KAEST-aktoj k.s.

Dirk Bindmann administras kaj de tempo al tempo aktualigas la retejon de TEC.

#### **Literaturo**

Blanke, Detlev (2003, Red.): ProCom’98. Sektion 3 „Terminologiewissenschaft und Plansprachen“. Beiträge der Internationalen Konferenz PROFESSIONAL COMMUNICATION AND KNOWLEDGE TRANSFER (Wien, 24 – 26 August 1998) Infoterm \* TermNet. En: Interlinguistische Informationen. Beiheft 10. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik., 160 p.

Blanke, Detlev/McCoy, Roy/Buller, Osmo (1999): Por aktiva lingvopolitiko. Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81-a Universala Kongreso de Esperanto, Prago 1996. Rotterdam. Universala Esperanto-Aocio, 70 p.

---

<sup>4</sup> <http://esperanto.net/tec/bibliografioj.html>

<sup>5</sup> <http://www.familienforschung-pabst.de/EspBiographien/PP-pdf/Terminoteko-01.pdf>

Blanke, Wera (1999): La Terminologia Esperanto-Centro: Spertoj, problemoj, perspektivoj. En: Malovec, Miroslav (Red.): Modernaj rimedoj de komunikado. Dobřichovice: KAVA-PECH, p. 140-147.

Blanke, Wera (2008): Esperanto, Terminologie und Terminologiearbeit. New York: Mondial, 153 p.

Oeser, Erhard/Galinski, Christian (1998, Eld.): Eugen Wüster (1898-1977). Leben und Werk – Ein österreichischer Pionier der Informationsgesellschaft. His Life and Work – An Austrian Pioneer of the Information Society. Wien: TermNet, 324 p.

Schweder, Sandra (1999): Entwicklung und Akzeptanz technischer Terminologien in der Plansprache Esperanto. Hildesheim: Universität Hildesheim, Fachbereich III – Sprachen und Technik, Institut für Angewandte Sprachwissenschaft, Man. 230 p.

Suonuuti, Heidi (1998): Terminologia gvidilo. (El la angla tradukis Sabine Fiedler, redaktis Wera Blanke). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 37 p.

Werner, Jan (1986): Terminologia Kurso. Roudnice nad Labem: Ĉeĥa Esperanto Asocio, 88 p.

Werner, Jan (2004): Terminologiaj konsideroj. Dobřichovice: KAVA-PECH, 179 p.

La retejo de TEC kun diversaj aldonaj materialoj kaj utilaj ligoj: <http://esperanto.net/tec/>

## 1.4 Aliaj menciindaj aranĝoj

Jam fariĝis tradicio, ke kadre de la kongresoj tuta programo de prelegoj kaj diskutgrupoj sub la nomo **Kleriga tago** donas al la kongresanoj la ŝancon informiĝi pri plej diversaj temoj kaj diskuti kun kompetentuloj. Menciidas i.a. la temoj „Kiel oni tradukas en Eŭropa Unio?“, „Aspektoj de informadiko“, „Vikipedio“, „Interkultura komunikado“, „Dua Vivo[Second Life]“ en la reto kaj prelego de Herbert Mayer pri la “Kolekto Planlingvoj” kaj la Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

Multaj prelegoj kaj diskutgrupoj estis dediĉitaj al la **jubileo de UEA**, kiu fondiĝis antaŭ 100 jaroj. Pri la temo i.a. prelegis *Humphrey Tonkin*. *Ulrich Lins* prezentis sian libron pri UEA „*Utila Estas Aliĝo*“. Tra la unua jarcento de UEA. Rotterdam: UEA, 2008, 126 p.

En aparta prelego, aldone al tiu kadre de la kleriga tago, *Herbert Mayer* parolis pri la riĉaĵoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko, en kiu troviĝas la plej granda interlingvistika kolekto. *Ziko van Dijk* prezentis la Vikipedion. Siajn problemojn en apartaj aranĝoj diskutis la Akademio de Esperanto kaj la Centro pri Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Aparte menciindas la eksperta grupo pri softvaraj problemoj, kie i.a. prelegis *Toon Witkam* kaj *Marek Blahuš*.

## 1.5 Premio Grabowski por du interlingvistoj

Fondaĵo Antoni Grabowski de UEA subtenas elstarajn atingojn de la Esperanta kulturo, precipe, sed ne nur, en la kampo de beletro. Ĉi-jare ĝiaj premioj havis interlingvistikan fokuson. La komisionanoj de la Fondaĵo (*Ulrich Lins*, *Istvan Ertl* kaj *Mine Yositaka*) aljuĝis du egalrangajn premiojn, je la valoro de po mil usonaj dolaroj, al *Ilona Koutny* kaj *Andreas Kuenzli*.

*Ilona Koutny*, hungara lingvistino vivanta en Pollando, kreis kaj jam de dek jaroj animas la popularajn kaj rekonatajn Interlingvistikajn Studojn ĉe Universitato Adam Mickiewicz en la pola urbo Poznań. Spirita heredantino de *prof. Istvan Szerdahelyi*, ŝi kvazaŭ transplantis la Esperantofakon de la Budapeŝta Universitato ELTE en polan grundon, kie ĝi disfloris internacie.

*Andreas Künzli* estas konata svisa interlingvisto, kiu antaŭ nelonge prezentis vere grandiozan libron pri universalaj lingvoj en Svisio. Li krome redaktas tre valoran retejon pri interlingvistikaj temoj: <http://www.plansprachen.ch/>.

## 2 Aranĝoj pasintaj

Ne eblas menciigi ĉiujn aranĝojn kun temoj de interlingvistika intereso, des pli, ke ni verŝajne ne estas informataj pri multo menciinda. Do, jen, nur kelkaj:

### 2.1 Internacia Esperantista Ĵurnalista Kongreso en Vilno

En la ĉefurbo de Litovio, Vilno, de 26-a ĝis 30-a de majo 2008 okazis la unua Internacia Esperantista Ĵurnalista Kongreso. Ĝin partoprenis ĉ. 200 personoj el 30 landoj. La programo enhavis diversajn fake interesajn prelegojn, de kiuj ni prezentas elekton (laŭ la programa sinsekvo):

<i>Humphrey Tonkin</i> (ĉeftemo)	Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto
<i>Aleksander Korĵenkov</i>	Zamenhof kaj la gazetaro
<i>Stano Marček</i>	100 jaroj de la revuo Esperanto
<i>Tomasz Chmielik</i>	Edmond Privat ( 1889-1962 ) – la patro de la moderna Esperanto-ĵurnalismo
<i>Detlev Blanke</i>	Informado en lingvistikaj medioj
<i>Peng Zhengming</i>	Konciza historio de ĉinaj Esperanto-gazetoj
<i>Andreas Kuenzli</i>	Tradicia percepto de la planlingva demando far la svisa gazetaro
<i>Dimitrije Janičič</i>	Eblecoj kaj formoj de kunlaboro de malgrandaj E-gazetoj
<i>Josip Pleadin</i>	Esperanto-ĵurnalismo kaj gazeteldonado en novaj teknologiaj kondiĉoj
<i>Ahmad Reza Mamduhi</i>	Kiel Esperanto ĵurnalistigis min
<i>Giorgio Silfer</i>	Kiel funkcias la cenzuro en la Esperanto-gazetaro
<i>Stefan MacGill</i>	Kiel adapti fizike presitan revuon al ret-konekta mondo
<i>Jevgenij Gaus /Peter Balaz</i>	Uzado de modernaj teknikoj en informado
<i>Vlado Jurkovič</i>	Dek kvin jaroj forpasis de kiam silentas Esperanto-programoj de Kroata Radio
<i>Jianhua Li</i>	Novaj interretaj teknologioj kaj Esperanto-movado
<i>Alfred Schubert</i>	La situacio de Esperanto-gazetoj en Germanio
<i>Yves Nevelsteen</i>	Komputeko
<i>Gabriela Kosiarska /Maciej Jaskot</i>	Specifeco de la interretaj elsendoj en la Internacia lingvo – novaj defioj por la radiofonio kaj novaj eblecoj por la movado?
<i>Petro Chrdle</i>	Aŭtoraj rajtoj en EU
<i>Zlatoje Martinov</i>	Interligo de naciaj literaturoj kaj Esperanto kiel literatura medio
<i>Dieter Rooke</i>	Porlaborista E-gazetaro
<i>Frimpong Ampomah Badu</i>	Esperanto kaj kulturoj en Afriko

<i>Ljubomir Trifonchovski</i>	Kultura politiko de kulturaj periodaĵoj (laŭ la sperto de revuo Literatura foiro)
<i>Stefan MacGill</i>	Malfacilaĵoj kaj ebloj por enmerkatigi por-junularan kaj por-komencantan revuon kaj teni ĝin aktuala kaj alloga por nuntempaj junuloj
<i>Jevgenij Gaus kaj Peter Balaz</i>	Nova retprojekto Esperanto-Aktuale
<i>Abdurahman Junusov</i>	Kunlaboro kun la amaskomunikiloj – strategio, rimedoj
<i>Jukka Pietilainen</i>	Nuntempaj defioj al internacia ĵurnalismo
<i>Istvan Ertl</i>	Interreto: La defioj de tuj-ĵurnalismo
<i>Kalle Kniivila</i>	Konformismo en la Esperanta gazetaro
<i>Roman Dobrzynski</i>	Esperanto – mia profesia pontolingvo
<i>Aleksandro Melnikov</i>	Reflektiĝo de la specifa E-kulturo en publicistiko
<i>Barbara Pietrzak</i>	Esperantlingva radiofonio en interkultura komunikado – sojle de la 50-jariĝo de E-elsendoj de Pola Radio
<i>Yu Jianchao</i>	Ĉina Radio Internacia, multimedia amaskomunikilo en la 21-a jarcento
<i>Claude Nourmont</i>	Kiel koncepti magazinon?
<i>Árpád Máthé</i>	Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto
<i>Gian Carlo Fighiera</i>	Konsideroj pri la Kongresa Gazetara Servo
<i>Frimpong Ampomah Badu</i>	Rolo de Esperanto en la nuntempa mondo
<i>Sean Ó Riain</i>	Esperanto: Malamiko aŭ amiko de plurlingveco
<i>Jukka Pietilainen</i>	Memreguligo kaj etiko en ĵurnalismo
<i>Perla Martinelli</i>	Virinaj voĉoj en la Esperanta gazetaro
<i>Alfred Schubert</i>	La estonteco de esperantlingvaj gazetoj
<i>Vilhelmo Lutermano</i>	La kontribuo de la Monde diplomatique (DIPLO) al la Esperanta ĵurnalismo
<i>Aneto Muhlemann</i>	Ĵurnalismo en kaj ekster Esperantujo: paraleloj kaj kontrastoj
<i>Giorgio Bronzetti</i>	Informado pere de Disvastigo

La unika aranĝo estis senpaga por ĉiuj partoprenantoj. La organiza teamo sub la gvido de *Povilas Jegorovas* faris bonegan laboron.

## 2.2 ARKONES XXIX 2008

La tradicia internacia aranĝo ARKONES, **Artaj Konfrontoj en Esperanto**, en 2008 jam la 24-a fojo, okazanta en Poznano/Pollando, 19a ĝis 21-a septembro 2008, ofertis kiel kutime ankaŭ multajn fake interesajn prelegojn. Jen elekto el ili:

- “Eĉ Esperantistoj kapablas ŝerci” (vortludoj en Esperanto) – *Aleksander Melnikov* (RU)
- “Frazeologio – uzado en tekstoj kaj bildoj” – *Sabine Fiedler* (DE)
- “Nova stato de Esperanto-muziko” – *Floréal Martorell* (FR)
- “100-jariĝo de UEA” – *Claude Nourmont* (FR)
- “Bona Espero – interkultura fenomeno” marĝene de la libro “Bona Espero – idealo kaj realo” – *Roman Dobrzynski* (PL)
- “Virinoj kaj lingvokreado” – *Věra Barandovská-Frank* (CZ/DE)
- “Zamenhof kaj la gazetaro” – *Aleksander Korĵenkov* (RU)
- “Poezio de skotaj Esperanto-poetoj kaj tradukoj de poezio de nacia poeto Roberto Burns” – *David Gilmour* (GB)
- „Lapenna kaj UN” – *Ziko van Dijk* (NL/DE)

“Tradukliteraturo en Esperanto (ekde Zamenhof ĝis la plej novaj tradukantoj)”

*Aleksander Korĵenkov* (RU)

„Publike paroli” – *Wera Blanke* (DE)

„Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj” – *Detlev Blanke* (DE)

„10 jaroj de interlingvistikaj studoj” – podia interparolo de *Ilona Koutny* (HU/PL), kun prelegantoj kaj studentoj de la Interlingvistikaj Studoj

“Problemoj kaj solvoj en tradukado de prozo” – *Michel Duc Goninaz* (FR)

## 2.3 KAEST '08

La 6-a aranĝo en la serio de KAEST (Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), kiu okazis de 7-a ĝis 9-a de novembro 2008 en Dobřichovice /ĉe Praha, kaj estis kiel kutime bonege organizita de d-ro Petro Chrdle kun sia firmao KAVA-PECH, enhavis denove interesajn prelegojn, kiujn ni mencias sube:

Detlev Blanke (DE):	La rolo de amatoroj ĉe la progresigo de scienco
Laszlo Szilvasi (HU):	Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko - STEB - resumo de 5-jara ekzisto
Jan Werner (CZ):	Kvar jaroj de Konstru-Forumo
Yves Nevelsteen (BE):	Enkonduko al fenomeno Vikipedio
Boĵidar Leonov (BG):	La rolo de la internacia patenta juro kaj la patent-teknika informado en la etapo de la ekologia ekspertizo
Rüdiger Sachs (DE):	La Serengetia Esplor-Instituto
Karel Votoček (CZ):	La plej precizaj geodeziaj laboroj
Johannes Mueller (DE):	Meĥanikaj ecoj de metalaj materialoj
Mikaelo Ĉertilov (RU):	Energetika aspekto de aplikado de gasaj motoroj por mini-varmelektrcentraloj
Francesco Maurelli (IT/GB):	Lokalizado kaj hejmeniro de aŭtonoma submara roboto
Pavla Dvořáková (CZ):	Seminario: Problemaro de fakaj artikoloj en esperantlingva Vikipedio
Jan kaj Lene Niemann (DK):	De kie venas trankvila intervivo?
Josef Vojáček (CZ):	Esperanto, scienco kaj tekniko
Petr Chrdle (CZ):	Propedeŭtika valoro de Esperanto aplikata al malpli inteligentaj infanoj >
Věra Barandovská-Frank (DE):	Esperanto-fakartikoloj en „grkg“
Miroslav Malovec (CZ):	Nia movado bezonas grandskalan arkivadon
Wera Blanke (DE):	Knedliko – ĉu terminologie bongusta?

La aktoj de la konferenco estas redaktataj kaj supozeble aperos en 2009.

## 2.4 18-a GIL-konferenco

La germana „Gesellschaft für Interlinguistik e.V.“ (GIL, Societo pri interlingvistiko) okazigis sian 18-an konferencon de la 21-a ĝis 23-a de novembro 2008 en Berlino. Jen la programo de la konferenco (laŭ la programa sinsekvo):

Benedikt Poller (Universitato Munkeno/DE) prezentis sian magistran disertacion:

*La kultura ligiteco de Esperanto – sociolingvistika esploro*

Prof. Dr. Bengt-Arne Wickström (Humboldt-Universitato Berlino/DE):

*Ekonomiaj aspektoj de la individua kaj socia plurlingvismo*

Prof. Dr. Goro Christoph Kimura (Sophia-Universitato Tokio/JP)

*Eperanto kiel minoritata lingvo - lingvosociologia esploro*

Prof. Dr. Otto Back (Universitato Vieno/AT):

*Kiom neperfektaj planlingvoj kaj etnaj lingvoj rajtas esti?*

Dr. Ilona Koutny (Universitato Adam Mickiewicz Poznano/PL):

*Esperanto kadre de la lingvo-tipologio kaj priuniversalajaj esploroj*

Dr. Biljana Golubović (Universitato Tübingen/DE):

*Esperanta kaj serba frazeologioj kompare*

Bc. Marek Blahuš, (Brno, Masaryk-Universitato/CZ, Katolika Universitato Leuven/BE):

*Ortografia kontrolilo por Esperanto kaj aliaj lingvoj*

PD Dr. Dr. Rudolf Fischer (Universitato Münster/DE):

*Esperanto, latina, angla, franca, itala kaj hispana kiel cellingvoj de tradukoj ĉe la ekzemplo de Struwwelpeter*

Dr. Věra Barandovská-Frank (Instituto por Kibernetiko, Paderborn/DE):

*Korrelativoj en Esperanto kaj en kelkaj h indoĝermanaj lingvoj*

Prof. Dr. Wim Jansen (Universitato Amsterdamo/NL):

*La eŭska kaj Esperanto en komparo ĉe elektitaj ekzemploj*

Cyril Brosch, MA (Libera Universitato Berlino/DE):

*Pri kunmetado kaj derivado en prahindoĝermanaj lingvoj kaj Esperanto*

Dr. habil. Cornelia Mannewitz (Universitato Greifswald/DE):

*Esperanto kaj Slovio - ebloj kaj limoj de lingvoplana kontinueco*

Harald-Dieter Schmidt-El Khaldi, BA (Wesseling):

*Interlingua kiel ponto-lingvo de la romana Eurocomprehension (Eurocom) - la Eŭrolingvistiko kiel parta pluevoluigo de interlingvistiko*

*Sebastian Kirf* registris la prelegojn sur video-DVD kaj jam surloke disponigis al la prelegintoj.

## **2.5 The cost of English Spelling**

The Spelling Society ([http://www.spellingsociety.org/media/items/cost\\_of\\_spelling](http://www.spellingsociety.org/media/items/cost_of_spelling)), angla organizaĵo prezidata de prof. d-ro John C. Wells, la 7-an kaj 8-an de julio 2008 okazigis en la universitato de Coventry konferencon kun la supra temo. Ni prezentas la anglalingvan alvokon kun la program-propono kaj supozas, ke la programo tiel realiĝis.

How much time, effort, and money is spent in schools, and in educational contexts generally, merely to cover the complexity of the current “traditional” English spelling system rather than teaching the joy of reading and writing?

This conference aims to draw attention to the financial, educational and cultural costs for all levels of the English Educational system, comprising

Universities, Schools, teachers and students arising from the difficulties in teaching reading and writing in the current spelling system, using recent research and comparisons related to the ease with which better structured orthographies in other languages are learned and taught. The above costs also include the often unrecognized expense (time and money) that employers and authorities incur in offering remedial courses to help otherwise vocally skilled people who have not managed to master the illogicality of English Spelling while being verbally adept in the language. The event is sponsored by the Spelling Society. Schedule (times subject to variation) Members who have booked a space will be able to use a display stand throughout the conference, on the theme of “The Cost of English Spelling”. Delegates will be able to view these during the refreshment breaks, and to receive a presentation by the displayer at one of the times shown in the indicative schedule below.

*Masha Bell:* “The most costly English spelling irregularities”

*Stephen Bett:* “The cost argument in historic appeals for spelling improvement”

*Keynote speaker: Prof. John Wells, President of the Spelling Society, Emeritus Professor of Phonetics, University College London:*

“Why do we need pronunciation dictionaries?”

*Christopher Jolly:* Remedial teaching of reading: a trial with reformed spellings

*Zuzana Kotercová:* The cost of teaching English in primary schools

*Raffaella Buonocore:* Does being a Chinese speaker reduce the time of learning English spelling?

*Anatoly Liberman:* The emotional costs of learning modern English spelling

*Valerie Yule:* The international costs of English spelling, and the comparative costs of improvement”

*Tom Zurinkas:* The costs of poor reading skills”

([http://www.spellingsociety.org/media/items/speaker\\_profiles](http://www.spellingsociety.org/media/items/speaker_profiles))

### 3 Universitataj konferencoj

#### 3.1 Interagado de etnaj kaj planitaj lingvoj en la kunteksto de la eŭropa integriĝo

*Nina Danylyuk*

La konferenco okazis de la 10-a ĝis 12-a de aprilo 2008 en la Volinia nacia universitato kun la nomo Lesja Ukrainka en la ukraina urbo Lucjk. Ĝi estis dediĉita al la Internacia jaro de Lingvoj 2008. La konferencon partoprenis 74 sciencistoj el Belgio, Britio, Italio, Pollando, Svislando kaj (ĉefe) Ukrainio. La nivelo de la persone prezentitaj aŭ malĉeestaj prelegoj estis sufiĉe alta: 4 doktoroj el eŭropaj landoj, 4 doktoroj el Ukrainio, 27 kandidatoj de sciencoj<sup>6</sup>, universitataj instruistoj, aspirantoj, studentoj.

Dum la malferma ceremonio elpaŝis la dekano de filologia fakultato *J. Hromik* kaj la vic-rektoro de la universitato *A. Cjosj*, la vic-estro de la departemento pri demandoj de interna politiko de Volinia ŝtata administracio *T. Litkovec*, la reprezentanto de la Oksforda universitato *R. Giles*.

---

<sup>6</sup> En Rusio kaj en la iamaj ŝtatoj de Soveta Unio „kandidato de scienco“ estas komparebla kun la eŭropa doktoro (PhD).



### Dum la plenkunsidoj oni prezentis jenajn prelegojn:

<i>N.Danylyuk</i> :	Lingva situacio en Ukrainio kaj la Eŭropa sperto
<i>N.Dzyubishina-Melnik</i> :	La Eŭropa ĥartio pri la regionaj aŭ minoritataj lingvoj
<i>V. Radĉuk</i> :	En kiu lingvo parolos Ukrainio en la jaro 2101?
<i>O.Kravĉuk</i> :	Lingva paletro de etnaj minoritatoj en Volinio
<i>N.Darĉuk</i> :	La elektronika vortaro de la lingvistika terminologio kun la inform-serĉanta sistemo
<i>T. Popova</i> :	La elementoj de multefaktora modelo por plialtigo de kulturo de la internacia komunikado
<i>E. Kovtonjuk</i> : (ĉiuj el Ukrainio)	La verkoj de V.Eroŝenko en la tradukoj de Lu Sinj el Ukrainio
<i>M. Jaskot</i> (PL):	Lingvo, popolo, identeco – pririgardo de la konceptoj en la kunteksto de la unuiginta Eŭropo komence de la XXI j.c.
<i>O. Kerziouk</i> (GB) :	Ukraina literatura avangardo de la XX j.c. kaj la lingvo Esperanto.

### Estis prezentitaj jenaj prelegoj en ukrainaj tradukoj :

<i>S.Ó Riain</i> (IE) :	La Defio de la Politiko de Plurlingveco kaj Lingvolernado
<i>D. Astori</i> (IT)	Fatta l'Europa, bisogna fare gli europei

### Laboris jenaj 7 sekcioj:

- (1) “Koncepta kaj lingva bildo de la mondo”
- (2) ”Pragmatikaj kaj sociolingvistikaj aspektoj de leksiko”
- (3) “Figuraj rimedoj en belartaj, sciencaj kaj religiaj tekstoj”
- (4) “Metodiko de instruado de gepatraj kaj fremdaj lingvoj”
- (5) “Lingvaĵo de amaskomunikiloj kaj eldonado”
- (6) “Kompilado de lingvaj komputilaj datumbazoj”
- (7) ”Funkciado de la internacia lingvo E kaj ĝia lernado”.

Necesas substreki, ke unuan fojon en Ukrainio en universitata scienca konferenco de internacia nivelo funkciis speciala sekcio, dediĉita al Esperanto, kies laborlingvo estis Esperanto. La sekcion gvidis *O. Kerziouk*, sekretariis *T. Popova*.

Komence la ĉeestantoj rememoris la forpasintan *C. Piron* kaj prezentis lian intervuaĵon “Kaj vi? Kion vi opinias pri la lingvoj en Eŭropo?”, kiun li estis sendinta por la konferenco.

Krome, estis prezentita la prelego de *R. Corsetti* “Nova modelo por instrui fremdajn lingvojn al junaj eŭropaj lernantoj: la modelo ‘Format ‘ kaj ĝia enhavo”.

Elpaŝis *N. Daniljuk* pri la vorto Esperanto kaj aliaj derivitaj vortoj en ukrainaj vortaroj, *S. Pogorelaja* kaj *A.Šlaĥova* prelegis pri metodikaj aspektoj de Esperanto-instruado, *N. Voloŝin* pri novaj eldonaĵoj de ukraina literaturo en Esperanto-tradukoj. Krome, ĉeestis la esperantistoj *M. Jaskot*, *E. Kovtonjuk*, *V. Taranjuk*, *I. Halajĉuk*. En la programo estis anoncitaj prelegoj de *V. Pacjurko*, *E. Slovaĉevsjka*, *M. Lineckij*, kiuj ne sukcesis veni kaj sendis la tekstojn.

La partoprenantoj akceptis rezolucion, en kiu ili substrekis la gravecon kaj altan nivelon de la prelegoj pri Esperanto, la neceson de specialaj sciencaj esploroj pri la Esperanto-movado, pri lingvaj kvalitoj de Esperanto, ĝiaj eblecoj kiel laborlingvo dum internaciaj konferencoj. Oni ankaŭ proponis uzi la resumojn de la artikoloj en Esperanto.

Ĉiuj ĝustatempe senditaj artikoloj aperis en la speciala eldono de la scienca revuo de Volinia nacia universitato, plene dediĉita al la konferenco en la ukraina, la rusa, la itala lingvoj kaj en Esperanto kun resumoj en la angla.

Kadre de la konferenco funkciis ronda tablo pri la temo “Etnaj stereotipoj en internacia kaj interpopola komunikado”, kiun partoprenis interesatoj el Ukrainio, Pollando, Britio kaj Usono. Estis prezentitaj interesaj pensoj pri la neceso eviti negativajn stereotipojn dum la eŭropa integriĝo. Sed tuj evidentiĝis la manko de komuna lingvo. Por 3 anglolingvanoj laboris 3 interpretistoj, krome estis uzataj la ukraina, la rusa kaj Esperanto.

La partoprenantoj de la konferenco akceptis rezolucion kun jena enhavo:

- 1 La temo de la konferenco estas aktuala kaj bezonas diversflankan regulan pristudon.
- 2 La temaro de la konferenco kunigis sciencistojn el diversaj universitatoj kaj institutoj de Ukrainio, Pollando, Britio, Italio, Belgio por interŝanĝi gravajn spertojn pri lingva politiko en Eŭropo.
- 3 Dum la konferenco estis vaste prezentitaj atingoj de lingvistikaj, psikolingvistikaj, etnolingvistikaj, socilingvistikaj kaj metodikaj esploroj en diversaj landoj. Krome estis preparolitaj la problemoj de funkciado de etnaj kaj planitaj lingvoj (ĉefe Esperanto, eŭropanto).
- 4 La spektro de la levitaj sciencaj demandoj kaj la uzo de Esperanto kiel laborlingvo montris la gravan rolon de Esperanto kiel sciencajn kaj internacian komunikilon.
- 5 La partoprenantoj decidis sendi leterojn al la prezidento de Ukrainio *V. Juŝĉenko*, la estro de parlamento *A. Jacenjuk* kaj ministroprezidantino *J. Timoŝenko* kun la propono uzi rimedojn por la plej rapida prikonsidero kaj konfirmo de la koncepto de la lingva politiko en Ukrainio, leĝo pri lingvoj en Ukrainio kaj revizio de la teksto de Eŭropa Ĉarto pri regionaj kaj minoritataj lingvoj (laŭ lingvistika kaj psikolingvistika aspektoj), al ministro pri edukado kaj scienco de Ukrainio kun la propono pli vaste uzi Esperanton kiel fakultativan studobjekton por specialigitaj lernejoj kaj universitatoj.  
La ĉeestantoj havis grandan kulturan programon, al kiu apartenis 4 ekskursoj, koncerto kaj komuna vespero.

La artikoloj, preparitaj laŭ la prelegoj de la partoprenantoj, aperis en jena scienca revuo :

*Naukovij visnik Volinsjkoho nacionalnoho universitetu imeni Lesi Ukrajinki: Filolohichni nauki. Lucjk, 2008. – №2. – 343 s. (Scienca informilo de Volinia nacia universitato nome de Lesja Ukrajinka : Filologiaj sciencoj), Lucjk, 2008 – №2. – 343 s. ISSN 1729-360X.*

## **Enhavo**

Ĉapitro 1. Lingva situacio kaj lingva politiko en Eŭropo.

*Danylyuk N.O.* (Ukrainio). Lingva situacio en Ukrainio kaj la Eŭropa sperto (7-14).

*Dzyubishina-Melnik N.* (Ukrainio). La Eŭropa Ĉarto pri regionaj aŭ minoritataj lingvoj (14 – 21).

*Sean Ó Riain.* (Irlando/Belgio). La Defio de la Politiko de Plurlingveco kaj Lingvolernado (21 – 23).

*Davide Astori.* (Italio). Fatta l'Europa, bisogna fare gli europei. Dell'europano, ossia: quando, per volonta comunicativa, tutto fa brodo... Dal "melting pot" culturale al "mixing pot" linguistico (24 – 33).

*Popova T. M., Pogoreckaja V.J.* (Ukrainio). La elementoj de multefaktora modelo por plialtigo de kulturo de la internacia komunikado (33 – 36).

*Nikolenko A.P.* (Ukrainio). Nenormaj variantoj de la angla lingvo (kreolaj kaj piĝinoj) kiel eblaj rezultoj de la procezo de la internacia komunikado (37 – 39).

*Kerziouk O.* (Britio). Ukraina literatura avangardo de la XX j.c. kaj la lingvo Esperanto (39 – 43).

Ĉapitro 2. Koncepta kaj lingva bildo de la mondo kaj traduko de teksto (44 – 93).

Ĉapitro 3. Pragmatikaj kaj sociolingvistikaj aspektoj de funkciado de la leksikaj unuoj (94 – 160).

Ĉapitro 4. Stilistikaj rimedoj en beletraj tekstoj (161 – 218).

Ĉapitro 5. Ukraina leksikografio kaj prilaboro de komputilaj datumbazoj (219 – 256.)

Ĉapitro 6. Metodiko de instruado de gepatraj kaj fremdaj lingvoj (257 – 297).

*Corsetti Renato.* Nova modelo por instrui fremdajn lingvojn al junaj eŭropaj lernantoj: la modelo "Format" kaj ĝia enhavo (257 – 260).

Ĉapitro 7. Lingvo de amaskomunikiloj kaj eldonado (298 – 343).

(*Nina Danylyuk* estas docentino de Volinia nacia universitato, estro de la ukraina sekcio de ILEI) Prosp. Sobornosti, 32, ap. 108, Lucjk 43026 Ukrainio, hejma tel. 38 (0332) 711348, poŝtel. +38 067 89 87 777, [nina\\_daniljuk@ukr.net](mailto:nina_daniljuk@ukr.net)

## **3.2 Esperanto kaj Interlingvistiko en Universitatoj – Konferenco en Amsterdamo**

### **3.2.1 Komunikado**

La Universitato de Amsterdamo de 17-a ĝis 18-a de julio 2008 estis kunvenejo de reprezentantoj de universitatoj, kie Esperanto kaj/aŭ interlingvistiko estas instruataj. Partoprenis 48 personoj el 38 universitatoj, esplorinstitutoj k.s. el 23 landoj. Temis pri labora konferenco, kunvokita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi donis al la partoprenantoj unuafoje la okazon komune pridiskuti siajn studprogramojn, la kondiĉojn sub kiuj ili laboras en siaj diversaj institucioj, kaj ebligi plifortigon de kunlaboro - inkluzive bibliotekajn interŝanĝojn kaj interŝanĝojn de personaro.

La konferenco okazis laŭ invito de la lektorato pri Esperanto kaj interlingvistiko en la Amsterdama Universitato, kun aktiva subteno de la Fakoj pri Lingvistiko.

La ĉefa motoro surloke estis *d-ro Wim Jansen*, kiu gvidas la lektoraton.

*D-ro Jansen* gvidis konferencan laborgrupon pri studprogramoj, *d-rino Sabine Fiedler*/Universitato Leipzig gvidis laborgrupon pri administrado de programoj, kaj *d-ro Ulrich Lins*/Germana Servo por Akademia Interŝanĝo (DAAD), Bonn, gvidis laborgrupon pri interŝanĝoj.

"Nuntempe la programoj pri Esperanto kaj interlingvistiko en diversaj landoj de la mondo laboras esence en izoleco," diris *prof. Humphrey Tonkin* de la Universitato Hartford/Usono, direktoro de CED kaj unu el la organizantoj de la konferenco. "Nia celo estas pliintensigi la konversacion inter la diversaj programoj por plifortigi iliajn poziciojn kaj doni reciprokan helpon."

Programoj pri Esperanto kaj interlingvistiko estas ofte starigitaj de unuopaj aktivuloj en difinitaj universitatoj; tamen ofte mankas al ili kontinueco. Sekve, plekti ilin en la strukturojn de la koncernaj universitatoj estas tre grave. Ankaŭ iliaj iniciatintoj ofte ne scias kiel kaj per kiuj studmaterialoj oni instruas en aliaj universitatoj. CED esperas starigi komunikan reton inter la programoj.

La konferencon finance subvenciiis ESF (Esperantic Studies Foundation), nordamerika fondaĵo, kiu subtenas esplorojn pri interlingvistiko kaj intemaciaj lingvaj problemoj. La konferenco estis malferma nur por invitoj.

Oni kolektis priteman materialon ĉe la retpaĝaro de la konferenco (<http://www.esperantic.org/ac-dokumentoj.htm>), tiel ke kaj la partoprenantoj kaj tiuj, kiuj ne povis ĉeesti, povis disponigi detalojn pri studmaterialoj, referaĵojn, raportojn ktp. al la konferencanoj.

La konferencon bonvenigis *prof. Anne Baker*, direktorino de la Amsterdama Centro por Lingvo kaj Komunikado, *Hans Erasmus*, iniciatinto de la lektorato kaj *d-ro Wim Jansen* nome de la Lektorato pri Esperanto kaj Interlingvistiko kaj *prof. Humphrey Tonkin* nome de CED.

Sekvis enkonduko al la temo de *John Wells*, emerita profesoro pri fonetiko de la “University College London” kaj prezidanto de la Akademio de Esperanto. Lian enkondukon komentis *d-ro Detlev Blanke* (Humboldt-Universitato) kaj *prof. Probal Dasgupta* (Indian Statistical Institute), prezidanto de UEA.

Ĉar la domo de la universitato, kie la konferenco okazis, portas la nomon de la fama nederlanda verkisto Pieter de Hooft, *Gerrit Berveling* prezentis la nomdoninton.

La aranĝo, kiu meritas ripetojn estonte, donis gravajn impulsojn por plifortigi la pozicion de Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj, altlejejoj kaj similaj institucioj.

### 3.2.2 Enkonduka prelego de John Wells<sup>7</sup>

Ni kunvenis por diskuti kiel instrui je universitata nivelo Esperanton aŭ interlingvistikon aŭ ambaŭ. En ĉi tiu mallonga ĝenerala enkonduko mi listigas amason da ‘kuglopunktoj’, kun la celo liveri kelkajn ideojn pri la eventuala fluo de niaj diskutoj.

Mi dividas mian prelegeton en kvar sekciojn: difini la disciplinon Esperanto, difini la disciplinon interlingvistiko, rilatigi nian laboron al nuntempaj intelektaj fluoj, kaj starigi demandojn pri praktikaj problemoj en universitatoj.

#### Difini la disciplinon: Esperanto

Evidente, unu el la ĉefaj taskoj de la Esperanto-movado estas instrui la lingvon: heredigi ĝin al novaj generacioj da parolantoj. Ĉu tio estas tasko ankaŭ por ni? Plej ofte, ni volos akcepti tiun taskon. Tamen — same kiel okazas en kelkaj institutoj de klasikaj lingvoj kiuj ne plu instruas la latinan, sed instruas anstataŭe pri ‘klasika civilizo’, kelkaj kursoj pri interlingvistiko preferas ne dediĉi la disponeblan tempon al la tamen temporaba tasko instrui la lingvon dekomence. Same kiel okazas por aliaj lingvoj, oni povas postuli jaman scion de la lingvo kiel kondiĉon por akcepti kandidaton en la studprogramo. Tio forigas la problemojn kiuj alie fluas el malsamaj lingvaj niveloj kaj malsama aĝo inter la studentoj.

Tiuj, kiuj tamen instruas la lingvon, okupiĝas pri la tradiciaj taskoj lernigi al la studentoj la gramatikon (larĝsence) kaj la vortprovizon. Tio havas du flankojn: praktikan (lingvoinstruan) kaj teorian (lingvopriskriban).

---

<sup>7</sup> Laŭ [www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/amsterdamo\\_2008.doc](http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/amsterdamo_2008.doc) (30.12.08).

Necesas demandi ankaŭ, kiel la universitataj studoj rilatu al la ĝenerala Esperanto-movado, Mi mencias la Interlingvistikajn Studojn de Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, kies studsemajno okazas oportune tuj antaŭ la festivalo Arkones.

Fundamenta tasko de universitatoj estas fari originalajn esplorojn. Ni esploru la lingvon mem: formale, el la vidpunkto de ĝenerala lingvistiko, demandante ekzemple kiel ĝi similas aŭ malsimilas al aliaj lingvoj, kiel ĝi ilustras aŭ ne la ‘universalajn’, la trajtojn komunajn de ĉiuj lingvoj; kaj praktike, kiel sociolingvistikan fenomenon unikan en la historio de la homaro. Ni esploru la ĉiaman dilemon, en la lingvouzo kaj lingvoevoluo, inter skemismo kaj naturalismo: ni observu kiel la pendolo balanciĝas inter tiuj du polusoj, de malsanulejo ĝis hospitalo, de allogaĵo al atrakcio, kaj de frazmelodio al intonacio.

En la socia flanko, ni esploru la historion de la Esperanto-movado. Ni paŭsu la dividon en la dudeka jarcento inter la idealoj de klaspolitiko unuflanke kaj neŭtralismo aliflanke; kaj en la lastaj jardekoj inter finvenkismo, la klasika celo de la movado, kaj la ‘jamvenkismo’, lanĉita per la Deklaracio de Raŭmo, laŭ kiu (por trosimpligi) Esperanto jam ekzistas, jam venkis, kaj estas plu nur uzenda kaj praktikenda sen la celo konverti la mondon.

Studi la literaturon de Esperanto estas unu inter pluraj studobjektoj de nia disciplino. Pri ties graveco ekzistas diversaj opinioj. Multaj universitataj fakoj de lingvoj, almenaŭ en mia lando Britujo, okupiĝas ĉefe ne pri la lingvo mem sed preskaŭ sole pri la literaturo de la koncerna lingvo. Tio laŭ mi estas bedaŭrinda afero, sed oni povas imagi la starigon de Esperanto-fakoj kun simila limigo de la studkampo.

Esplorante la Esperanto-literaturon oni ne nur okupiĝas pri unuopaj aŭtoroj sed volas difini periodojn kaj skolojn, stilojn kaj ĝenrojn. Oni aplikas la aparaton de literatura kritikado, ne forgesante modernajn tendencojn (ekzemple strukturalismo, intertekstismo ktp). Oni esploras, kiel la literaturo de Esperanto rilatas al alilingvaj literaturoj.

### **Difini la disciplinon: interlingvistiko**

Povas esti, ke paroli pri interlingvistiko estas pli akceptebla en multaj universitataj rondo ol paroli rekte pri Esperanto. Tamen interlingvistiko ne estas nura kaŝnomo por Esperantaj studoj.

Bona komencpunkto povas esti la intelektaj fluoj de la dua duono de la dek-naŭa jarcento: la fluoj, kiuj animis doktoron Zamenhof en lia projekto. En tiu epoko okazis frapaj novaj inventoj — fervojo, telegrafo — kaj baldaŭ okazos ankoraŭ aliaj mondskuaj inventoj — telefono, radio, aŭtomobiloj. En la unuaj jaroj Esperanto estis sentata kiel moderna invento same signifa por la tuta mondo.

Bone estas rigardi la pozicion de Esperanton en la longa intelekta historio de projektoj de lingvoj artefaritaj, logikaj, filozofiaj, idealaj, konstruitaj, planitaj. Kiuj estis la specialaj kvalitoj aŭ cirkonstancoj, kiuj kondukis al ĝia relativa sukceso?

Oni povas esplori aliajn projektojn de komuna lingvo. Eventuale iuj volos instrui la elementojn de Volapük aŭ de Ido por komparo.

De kie venis la ideo, ke en la mondo ekzistas “lingva problemo”? Ĉu tiu problemo estas sentata same nun, kiel antaŭ 120 jaroj?

La emo plibonigi, normigi, krei lingvon estas multe pli vasta temo ol interlingvistiko. Ekzistas tuta studofako ‘lingvoplanado’, kiu restas aktuala temo en multaj triamondaj landoj.

Ni ne preteratentu la ideologian flankon, la t.n. ‘internan ideon’. Novan puŝon al tiaj konsideroj donis la verkisto Umberto Eco, aŭtoro de La Perfekta Lingvo. Mi citas:

"La homoj daŭre perceptas Esperanton kiel la proponon de ilo. Ili scias nenion pri la idea impeto, kiu ĝin vivigas. Tamen, ĝuste la biografio de Zamenhof ravis min. Necesus pli bone diskonigi tiun aspekton! ... La historia kaj ideologia flanko de Esperanto restas funde nekonata."

Ni volonte frontas la demandon, kio estas la diferenco inter lingvo kaj kodo? Inter 'naturaj' homaj lingvoj kaj komputila aŭ maŝina lingvo? Kiuj estas la motivoj, por lokigi Esperanton firme inter la t.n. naturaj lingvoj?

La studo pri la historio de piĝinaj kaj kreolaj lingvoj estis fruktodona en la teoriado de lingvistiko. Kiel povas esti, ke frakasitaj socioj sen komuna lingvo povas kvazaŭ mem inventi novan lingvon por ebligi almenaŭ minimuman komprenon? Kio okazas al la dua generacio kaj la sekvaj generacioj en tiaj socioj? Unu provo klarigi la aferon estas la 'hipotezo de la bioprogramo', laŭ kiu la similecoj inter malsamaj kreolaj lingvoj ne estas klarigeblaj sole laŭ la supertavola kaj subtavolaj lingvoj, sed devas dependi de kapablo, ennaskita en la infano, strukturi la gramatikon laŭ universalaj principoj genetike heredataj, kiel komuna heredaĵo de ĉiuj ni anoj de la specio Homo. Kiel tio rilatas al la fenomeno Esperanto?

Ni ne forgesu la pragmatikon. En la lingvistiko oni aludas per tiu esprimo al la kapablo de parolantoj de naturaj lingvoj komuniki pli ol tion, kion oni efektive diras. La kapablo kompreni kion signifas la diraĵo de alia parolanto estas 'pragmatika kompetento'. Ekzemple ni povas ŝerci, troigi, mensogi, ironii, sarkasmi. Se mi diras "Estas terure varme", vi ne tuj supozas, ke pro la varmo mi estas en tre forta timo (teruro). Se vi respondas "Kial ne malfermi fenestron?" vi ne vere serĉas kialojn por ne malfermi fenestron.

Alia pragmatika fenomeno estas tio, ke ankaŭ en Esperanto ni uzas frazmelodiojn: sed neniu instruas aŭ lernas, kion signifas frazmelodio (pri tio mi prelegos en la UK). Mi ĵus diris, "la UK": kiel do vi sciis, ke mi celas la venontan semajnon en Roterdamo, ne alian UK? Pro pragmatika kompetento. Tiaj fenomenoj ekzistas en la angla, en la ĉina, en la zulua, en Esperanto: sed ne en komputilaj programoj, ne en HTML.

Aparta demando por lingvistoj interesiĝantaj pri Esperanto estas jena: kio estas la sekvoj de ĝenerala nedenaskeco? Kion signifas, ke la plimulto de ĝiaj parolantoj unue akiris alian lingvon? Kio estas la apartaj ecoj, kontraste, de Esperanto kiel lingvo denaska?

Laste, en interlingvistiko, oni volas studi tute ĝenerale la funkciadon de lingvoj en internaciaj rilatoj. Oni volas kompari la solvon eventuale proponitan de Esperanto precipe kun la solvo (aŭ nesolvo) prezentata de la uzo de la angla kiel lingvo dua, aldona, fremda, internacia. Kaj mi asertus, ke la angla kiel fremda lingvo estas ofte same artefarita — se uzi tiun terminon — aŭ eĉ pli artefarita, ol estas Esperanto.

Al kiu aŭ al kiuj apartenas tiu aŭ alia lingvo? En la historio de la planlingvoj, konata estas la malsama konduto de Schleyer, kiu volis reteni Volapük kiel propran posedaĵon, kaj Zamenhof, kiu volis transdoni al la uzantoj ĉiujn rajtojn pri Esperanto. Leviĝas simila demando hodiaŭ pri la angla lingvo, precipe en landoj, en kiuj ĝi estas uzata administre, komerce, eduke (ekzemple Niĝerio, Singapuro, Barato). Ĉu ili rajtas mem difini sian lokan version de la norma angla lingvo, aŭ ĉu ili ĉiam devas kulture submetiĝi al la normoj de Britujo kaj Usono?

En tiaj landoj la landanoj povas senti fortan emocian ligitcon al la origine fremda lingvo. (Mi vidis tion frape en Kameruno, kie unu provinco estis antaŭe brita kolonio, kaj do uzas la anglan, dum la cetera lando estas eksfranca, do uzas la francan. La anglalingvaj kamerunanoj estis ravitaj, kiam la ŝtatestro parolis al ili kelkajn vortojn en la angla.)

Leviĝas la sama demando pri la angla uzata inter nedenaskaj parolantoj, ekzemple kiam svedo negocas kun japano aŭ ĉino kun ganaano. Ĉu la denaskaj parolantoj de la angla ankoraŭ havas la

rajton difini ĝin? insisti, ke svedoj lernu la fonetikan diferencon inter [s] kaj [z] kaj la gramatikan inter do you smoke? kaj are you smoking? aŭ ke la japanoj mastru la diferencon inter [r] kaj [l] kaj inter singularo kaj pluralo?

Leviĝas similaj problemoj pri aliaj tiel nomitaj 'lingvoj de pli larĝa kontakto' (la franca, la hispana, la portugala, la rusa, la ĉina). Cetere, ĉu estas akceptebla, ke la mondo restu dividita laŭ tiuj historie difinitaj lingvoteritorioj? Ke mozambikano faras siajn eksterlandajn kontaktojn unuavice per la portugala, togolandano per la franca, ugandano per la angla? Kio pri la speciala pozicio de la klasika araba lingvo, spegulanta ankoraŭ en la islamaj landoj la iaman rolon de la latina en la kristana okcidento?

### **Rilatoj al nuntempaj intelektaj fluoj**

Oni ne forgesu la rilaton inter Esperanto-interlingvistiko kaj la intelektaj fluoj de la nuntempa mondo. Eble plej grava estas la tutmondiĝo (globalization) de la komerco kaj de la intelekta vivo. Kio estas la rilato — ne, ĉu entute ekzistas rilato, inter la trinkado de Coca-Cola kaj la uzado de la angla lingvo? Ĉu estas vere, ke la angla lingvo 'minacas' aliajn lingvojn? Se jes, ĝuste kio estas minacata?

Kiel ni rilatas al la kontraŭaj tendencoj de tutmondiĝo unuflanke kaj lokismo aliflanke? en Eŭropo, inter federaciismo kaj regionismo?

Ĉu oni pravus, ligante la demandon pri Esperanto al la demando pri endanĝerigitaj lingvoj? Kion la homaro povus aŭ devus fari pri la malaperantaj lingvoj de Amazonio, Nov-Gvineo, Afriko?

(Ĉu ekzistas ia rilato inter Esperanto-interlingvistiko kaj ekologio? kaj klimatsanĝo? Kredeble ne, sed kiu scias?)

Kio estas la sekvoj de novaj inventoj kaj eltrovoj en la elektronika kampo? De poŝtelefonoj, de tuja konektiteco per la interreto, de Facebook aŭ Ipernity? De porteblaj parolantaj elektronikaj vortaroj kaj frazlibroj?

Ĉu fine portas frukton la multjara esplorado pri maŝintradukado? Ni esperantistoj scias pri la projekto DLT, kiu uzis Esperanton kiel pontolingvon, sed tio estis antaŭ dudek jaroj. Ĉu la lingvoteknologio de aŭtomata parolrekono kaj parolsintezo liveris uzablajn rezultojn en internacia nivelo? Mi atentigas, ke Babelfish, la aŭtomata tradukprogramo de Yahoo, "ne pretendas liveri perfektan tradukon"; sed por iuj celoj ĝi povas esti vere utila.

### **Praktikaj problemoj en universitatoj**

Ni volas en niaj diskutoj atenti ankaŭ praktikajn problemojn. Se ni volas, ke Esperanto-interlingvistiko ludu rolon en niaj universitatoj, kiel ni enkadrigos ĝin en la studprogramoj? Ĉu ĝi povas roli en la licencia studprogramo? la magistra? la doktora? Aŭ ĝi sidu ekster tiuj ĉefaj programoj (kiel plejparte nun), troviĝante en mallongaj kursoj? Ĉu eblas integri ĝin kun aliaj studobjektoj?

Ni ne povas ne atenti la aktualajn klopodojn harmoniigi la formon de la universitataj studoj en diversaj landoj, aŭ laŭ la usona modelo, aŭ laŭ la eŭropa bolonja modelo.

Ĉu ni povas ekspluati la internaciajn programojn de niaj universitatoj? Kiel ni povas evoluigi, ekzemple, studentajn interŝanĝojn inter diversaj landoj?

Plej praktike, kiel ni povas plej bone starigi kaj flegi rilatojn kun rektoroj, dekanoj, administrantoj, kaj aliaj, en kies manoj kuŝas la decidopovo en la universitato? Kiel certigi, ke niaj bezonoj estas atentataj de la universitataj bibliotekoj? Kiel atingi influon en esplorkomitatoj kaj, ne malplej grave, en la fondaĵoj kapablaj liveri financajn rimedojn por niaj laboroj?

Ni volos ankaŭ provi trovi solvon al la demando pri taŭgaj studmaterialoj. Fine, ni devas iel zorgi pri kontinueco en niaj laboroj, por ke studoj de Esperanto-interlingvistiko en unu universitato ne malaperu kiam unu engaĝita unuopulo foriras, emeritiĝas, aŭ mortas.

### 3.2.3 Komentoj

*Detlev Blanke*

John Wells en sia bonega prezento menciis preskaŭ ĉiujn traktindajn kaj diskutindajn problemojn. Mi klopodos komenti resp. fokusigi nur kelkajn:

1 Ni distingu du tipojn de universitata instruado de Esperanto kaj interlingvistiko. La instruado nacilingva en la universitatoj. La celgrupoj estas regulaj studentoj de diversaj fakoj, kiuj ĝenerale nenion aŭ nur malmulton scias pri la temoj. La alia celgrupo estas studentoj, kiuj scipovas Esperanton kaj disponas – en ideala kazo – pri universitata diplomo. Tiam postdiploman instruadon pri interlingvistiko aktuale ofertas nur la Universitato Adam Mickiewicz Poznano, kie *d-rino Ilona Koutny* en 2008 jam la dekan jaron gvidas la Internaciajn Interlingvistikajn Studojn.

2 Difinante la celojn de nia universitata instruado ni konsciu, ke en la praktiko ĉefe temas pri Esperanto-kursoj. Laŭ la enketo de *Germain Pirlot\** por la jaro 2008 de 68 kursoj (en 24 landoj) ĉe nur 15 mi trovis indikojn, ke en la instruplano troviĝas temoj kiel interlingvistiko, planlingvoj, lingvo-politiko, lingvo-planado ks., do temoj kiuj estas ligitaj al larĝa kompreno pri la objekto de interlingvistiko. (\* <http://uea.org/agadoj/instruado/universitatoj.html> )

Por doni stabilan fundamenton al Esperanto-kursoj necesas doni multe pli da atento al la scienca bazo: internacia lingva komunikado kaj la diversaj komunikiloj, inkl. planlingvoj, lingvaj rajtoj, lingva diskriminacio ks.

Verŝajne estas pli facile trovi homojn akceptatajn en la universitato por gvido de Esperanto-kursoj ol por tiaj prelegoj. Depende de la landaj kaj universitataj tradicioj kaj kutimoj, preleganto (aŭ okaziganto de sciencaj seminarioj) devas esti doktoro pri lingvistika fako aŭ disponi pri komparebla kvalifiko.

3 Proponante interlingvistikajn kursojn en difinitaj universitatoj valorus substreki la ĝeneralan lingvistikan valoron de tiuj prelegoj. Sub interlingvistika aspekto – pli limigite: sub planlingva aspekto – eblas prilumi ĝenerallingvistikajn problemojn laŭ nekutima maniero. Necesus verki libron ekz. pri la temo “La lingvistika valoro de la okupiĝo pri planlingvoj ĝenerale kaj pri Esperanto aparte”.

4 Ligitaj al la sciencaj prelegoj pri interlingvistiko kaj depende de subtenantaj profesoroj ne estas maleble – kiel montras multaj kazoj – verki magistrajn, doktorajn aŭ alispecajn disertaciojn pri interlingvistika temo. Ĝuste inter tiaj homoj oni trovu la estontajn specialistojn pri interlingvistiko kaj pri Esperanto-kursoj, kiujn universitatoj akceptus kiel kompetentaj kaj kiuj garantias certan nivelon.

Por trovi, motivigi kaj klerigi tiajn homojn necesus pli da streĉoj sur landa kaj internacia niveloj. Internacinivele la kursoj en Poznano donas bonan kontribuon. Landnivele necesus organizi kaj aktivigi interesajn homojn en iuj sciencaj societoj. La spertoj en Germanio kun la Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinuistik e.V.) estas pozitivaj (kp. Blanke 1999, O’Riain 2003, Corsetti 2005).

La lastan bibliografion pri magistras, doktoras kaj alispecaj disertacioj faris *Edward Symoens* (1989 kaj 1995). Pri faktoj komunikataj al mi, kiuj rilatas al universitataj laboraĵoj mi informas



laŭeble en “Informilo por Interlingvistoj”, sed certe tre mankohave. Ekzemple nek Symoens nek mi kapablis akiri plenan superrigardon pri la studo-finaj disertacioj, kiujn verkigis Szerdahelyi kaj liaj posteuloj en la fako Esperanto de la ELTE-Universitato de Budapeŝt.

5 Esperanto ne ekzistas sen sia lingvo-komunumo, sendepende de tio, kiom kritike oni devas rigardi kelkajn fenomenojn. Sekve, instruante Esperanton oni ne limigu sin al la lingvo mem, sed ankaŭ instru pri la lingvokomunumo, ties strukturo, tendencoj, historio, tradicioj k.s.

6 Gravan rolon ludas la disponebla faka literaturo. Laŭ mia superrigardo en la germana kaj la angla ekzistas la plej multaj uzeblaj verkoj. La anglan oni ja legas, sed nepre ankaŭ ne eblas ignori la germanan fakan literaturon. Aparta speco de faka literaturo estas universitataj instruiloj. Nur *István Szerdahelyi* kaj liaj koleg(in)oj verkis ĉ.10 universitatajn lernolibrojn, parte en Esperanto, parte en la hungara. Krom li universitatajn studmaterialojn por interlingvistikaj kursoj verŝajne nur verkis *Werner Bormann* (1995) kaj *Wim Jansen* (2003).

Bazo por bonaj universitataj kursmaterialoj estas enciklopediecaj superrigardaj verkoj pri Esperanto – lingvo, literaturo, aplikoj kaj lingvo-komunumo.

Pozitive: Ĝus aperis enciklopedio de la originala esperanta literaturo (en la angla!) de *Geoffrey Sutton* (2008).

Negative: Ni ankoraŭ ne havas sciencan gramatikon de Esperanto, nek biografion de Zamenhof.

## Literaturo

Blanke, Detlev (1999): Germana societo *Gesellschaft für Interlinguistik*. En: Esperantologio – Esperanto Studies (EES), Kajero 1: 38-47.

Bormann, Werner (1995): *Die Hamburger Interlinguistik-Vorlesung*. Kiel: Strigo.

Corsetti, Renato (2005): *En Germanujo pli ol aliloke: esperantologia agado*. En: Esperantologio-Esperanto Studies (EES), Kajero 3: 40-44

Jansen, Wim (2003): *Elementen uit de Interlinguistiek*. Amsterdam: Universiteit van Amsterdam (preskaŭ ĉiujare aktualigata kaj prilaborata).

Ó Riain, Seán (2003): The German Interlinguistics Society. En: *Language Problems&Language Planning* 27, 3:269-277 (same en *Ipl* 12, n-ro 46 (3/03), p. 2-9.)

Symoens, Edward (1989): Bibliografio de universitataj kaj altlernejaj diplomverkoj, disertacioj kaj tezoj pri Esperanto kaj interlingvistiko. *Bibliographie: Thèses et dissertations universitaires ou d' instituts superieurs sur l'espéranto et l'interlinguistique. Dissertations and theses on Esperanto and interlinguistics: A bibliography*. Rotterdam: Universala Esperanto Asocio.

Symoens, Edward (1995): Bibliografio de Disertacioj pri Esperanto kaj Interlingvistiko. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. (Kompletigo al Symoens 1989).

Sutton, Geoffrey (2008): *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*. New York: Mondial.

### 3.2.4 Konkludoj de la konferenco

Kvindeko da fakuloj el 39 universitatoj kaj esplorinstitutoj en 23 landoj kolektiĝis ĉe la Universitato de Amsterdamo por pridiskuti tri ĉefajn temojn:

- (1) studprogramojn kaj kursmaterialon pri Esperanto kaj interlingvistiko
- (2) interŝanĝojn de profesoroj, studentoj, kaj materialoj
- (3) administran starigon, daŭrigon kaj fortigon de programoj.

En sia fina sesio, ili ellaboris la jenajn konkludojn.

## (1) Studprogramoj

Ni utiligu la retejon [edukado.net](http://edukado.net), kiel konvenan kolektejon de materialoj kaj interŝanĝejon de spertoj, ideoj, projektoj ktp. (Katalin Kovats, ĝia prizorganto, estas preta tion plenumi, se venos la necesa kunlaboro; tiu ĉi rekomendo rilatas ne nur al studprogramoj sed al la laboro de la konferenco ĝenerale).

Necesas fari inventaron (ekzemple ĉe [edukado.net](http://edukado.net)) de ekzistantaj materialoj (studprogramoj en unuopaj universitatoj, studmaterialo en formo de kurslibroj ktp.). Kelka materialo estis kolektita kunlige kun la nuna konferenco kaj troviĝas portempe ĉe la retejo de Esperantic Studies Foundation. Ĝin oni povus prefere transigi al [edukado.net](http://edukado.net).

La admirindan laboron de *Germain Pirlot* (listigo de universitatoj kie Esperanto estas instruata) necesas daŭrigi, sed gravegas pli aktiva kunlaboro kun li (prefere kun plia detaligo de la programoj mem) kaj respondemo al liaj komunikoj. Jam komenciĝis kunlaboro inter [edukado.net](http://edukado.net) kaj G. Pirlot, cele al starigo de facile konsultebla listo en la reto.

Ekzistas eĉ kelkaj proponoj pri manlibro pri interlingvistiko, verkita en la angla (kiel la plej disvastiĝinta lingvo en la fako lingvistiko, sed kun la celo traduki ĝin en aliajn lingvojn kaj unuavice en Esperanton). Tiu manlibro povus havi plurajn formojn. Unu ebleco estus kvazaŭ antologio de unuopaj ĉapitroj pri interlingvistikrilataj demandoj (ne nur ekzemple komparaj studoj pri planlingvaj projektoj, sed ankaŭ pri la rilato planlingvoj/lingvoplanado, pri la politikaj kaj sociaj kondiĉoj ĉirkaŭantaj planlingvojn, pri lingvoekonomiko rilate kun planlingvoj, pri la rolo de planlingvoj en la intelekta historio ktp.). Tiaj antologioj ekzistas en la angla lingvo por pluraj parencaj fakoj (ekzemple tradukado de *Venuti 2000*, aplika lingvistiko de *Kaplan 2002*, socilingvistiko de *Coulmas 1997*, ktp.). Aliaj eblecoj inkluzivus ĝisdatigon kaj tradukon de ekzistantaj materialoj (ekzemple de *Jansen* aŭ *Blanke* aŭ *Barandovská-Frank*).

Similan bezonon oni sentas koncerne bone prezentitan libron pri Esperanto (iom simila al La fenomeno Esperanto de *Auld*, kvankam pli objektiva kaj scienca). Tia libro vere ne ekzistas en la angla lingvo, kaj tiu manko verŝajne malhelpas nian fakon ĉe lingvistoj. Estus bone se prestiĝa eldonejo povus eldoni tian libron en la angla kaj poste oni povus traduki ĝin en aliajn lingvojn. *Hokan Lundberg* jam ekskizis eventualan enhavon de tia libro.

Ellaboro de studprogramoj por diversaj niveloj. Kvankam la situacio varias multe de unu universitata sistemo al alia (aŭ eĉ unu universitato al alia), estus bone havi je nia dispono plurajn modelojn de studprogramoj facile adapteblajn.

Oni atentigis pri la valoro de someraj (aŭ similaj) sciencaj seminarioj kiuj estos agnoskitaj de la universitata medio. Oni pridiskutis diversajn formojn de tiaj altinivelaj malgrandaj seminarioj, taŭgaj por doktoraj studentoj kaj eventuale ankaŭ por novaj universitataj instruistoj. Universitata agnosko gravus.

Kolektu diplomlaboraĵojn (daŭrigu kaj profundigu la laboron de *E. Symoens*). Siatempe E. Symoens kolektis detalojn pri (laŭ sia eblo) ĉiuj disertacioj kiuj rilatas al Esperanto kaj interlingvistiko, kaj aperigis volumon kaj suplementon kie ili estis listigitaj. Necesas restarigi tiun laboron, ekzemple pere de rete alirebla listo (ĉe [edukado.net](http://edukado.net)?).

Estas proponite, ke la venonta ILEI-konferenco (Krakovo, Pollando, 18-25 julio 2009) traktu interalie universitatan kunlaboron, kaj do iel daŭrigu la starigitan dialogon.

## **(2) Interŝanĝoj**

Ni utiligu specifajn interŝanĝprogramojn universitatajn. Preskaŭ ĉiuj universitatoj havas siajn interŝanĝprogramojn kun specifaj eksterlandaj universitatoj. Kie eble, ni uzu tiujn ekzistantajn strukturojn por faciligi kaj foje eĉ financi interŝanĝojn de profesoroj kaj studentoj. La interŝanĝado de profesoroj devas ne limiĝi al Esperanto kaj interlingvistiko: profesoro kiu instruas ekzemple anglistikon kaj Esperanton povus fari gastviziton surbaze de sia anglistika sperto sed tamen utiligi la viziton ankaŭ por Esperanto.

Ni sciigu al esploristoj informojn pri eblaj monfontoj, kaj instigu la esploristojn mem esplori pri manieroj financi interŝanĝojn. Precipe ene de Eŭropa Unio, sed ankaŭ aliloke, ne mankas subvencioj – ĉu de EU ĉu de unuopaj registaraj aŭ duonregistaraj instancoj (DAAD, Fulbright k.s.). Kvankam en certaj kategorioj tiaj stipendioj por studentoj kaj profesoroj estas malfacile akireblaj, en multaj aliaj kategorioj estas foje pli da mono ol da vere seriozaj sinproponoj.

Por faciligi la du ĉi-suprajn iniciatojn, estus bone se interlingvistoj interŝanĝus siajn spertojn pri kiel ili akiris stipendiojn, ktp – do donante praktikajn konsilojn.

Interŝanĝoj ne devus limiĝi al unuopuloj: eblus starigi esplorgrupojn universitatajn, ekzemple pri socilingvistiko (en kiu Esperanto aŭ interlingvistiko havu sian lokon) aŭ intelekta historio, aŭ simile, kaj kolektive serĉi subvenciojn por specifaj interŝanĝoj.

Indus inventari konkretajn ekzistantajn eblecojn (ekzemple en Ĉinujo kaj en la programo Erasmus de EU).

Gravas uzi Esperanton en interdisciplina laboro, tiel ke ĝi trovu nature sian rolon en aliaj studkampoj. Krome, gravas, ke ni reciproke antaŭenigu la karierojn de niaj kolegoj, ne nur en rilato kun Esperanto kaj interlingvistiko, sed ankaŭ alimaniere. Se ekzistus forta grupo de elstaraj universitatanoj en diversaj fakoj, sed ĉiuj kun serioza interesiĝo pri Esperanto kaj interlingvistiko, la vojo estus multe pli glata, kontinueco estus pli facile certigebla, kaj interŝanĝoj fariĝus pli facilaj.

Plia kampo por kunlaboro kaj interŝanĝoj estas evoluigo de peresperanta instruado kaj studado – do utiligo de Esperanto por aliaj studkampoj, iom laŭ la modelo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS).

Interŝanĝoj de personoj ne estas la sola formo de interŝanĝoj. Gravas ankaŭ la efika utiligo de ekzistantaj bibliotekaj kolektoj, interalie por suplementi la ofte malfortajn kolektojn en unuopaj universitataj bibliotekoj.

## **(3) Starigo, daŭrigo kaj administrado de programoj**

Ni flegu rilatojn kun dekanoj kaj rektoroj. Starigo kaj daŭrigo de programoj ofte dependas de la preferoj de fakestroj kaj dekanoj. Sekve, gravas krei pozitivajn rilatojn kun tiuj, kiuj faras decidojn.

Ni invitu gastprofesorojn al niaj universitatoj cele al altigo de la profilo de Esperanto kaj interlingvistiko. Vizitoj de respektataj profesoroj el aliaj universitatoj, kiuj interalie okupiĝas pri Esperanto kaj interlingvistiko, helpas altigi la reputacion de Esperanto kaj interlingvistiko.

Fundamenta problemo tamen restas la malalta prestiĝo de Esperanto. Esperanto (kaj sekve interlingvistiko) ne ĝuas altan sciencajn reputacion. Ĉu Esperanto estas “vera” lingvo? Ĉu ĝi estas marĝena fenomeno pri kiu okupiĝas nur marĝenuloj? Grava elemento en la taskaro de fakuloj pri Esperanto kaj interlingvistiko estas montri, per sia instruado kaj siaj esploroj, la

intelekto kaj scienco kernan pozicion de interlingvistiko kaj Esperanto (iom laŭ la ekzemplo de Umberto Eco en sia verko *La serĉado de la perfekta lingvo*). Tiu ĉi temo meritas pli multan diskutadon.

Gravas konscii pri la ligiteco de universitataj programoj kun la lerneja instruado de infanoj. Ni pretigu materialon por instruistoj de infanoj kaj atentu pri la antaŭuniversitata medio ĝenerale.

Kvankam normigaj programoj (Bolonjo; la Referenckadro) limigas la flekseblecon, ili estas ankaŭ ekspluateblaj por Esperanto kaj interlingvistiko. Profesoroj de Esperanto kaj interlingvistiko devas bone koni tiujn limigojn kaj potencialojn, evitante la unuajn kaj ekspluatante la duajn. Kiel supre menciite, gravas, ke ni reciproke antaŭenigu la karierojn de niaj kolegoj, ne nur en rilato kun Esperanto kaj interlingvistiko, sed ankaŭ alimaniere. Kolegoj kunlaboru ĉirkaŭ komunaj intereso.

Konsiderante la relativan malofton de programoj kaj fakuloj pri Esperanto kaj interlingvistiko, aparte fekunda grundo povus esti evoluigo de neĉeestaj (distancaj) programoj.

(*A. Giridhar Rao*, sekretario de la konferenco; *Humphrey Tonkin*, prezidanto)

### 3.3 Poznań: Interlingvistika Simpozio okaze de la 10-jariĝo de la Interlingvistikaj Studoj de UAM

*Ilona Koutny*

Post la ĉi-jara interlingvistika sesio en UAM kolektiĝis pli ol 80 homoj en la moderna konferencujo de UAM (Universitato Adam Mickiewicz) por la du-taga simpozio (18.-19.09)

#### “Lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko”

Alvenis grandparto de la kursgvidantoj, malnovaj kaj novaj gestudentoj de la Studoj, krome grandnombre specialistoj kaj interesiĝantoj pri interlingvistiko el 22 landoj (de Germanio tra Rusio ĝis Brazilo kaj Irano) por kune festi la 10-jariĝon de la Studoj.

La riĉa programo de la simpozio komenciĝis per **malferma bloko**, kie gvidantoj de UAM (vicrektoro de UAM *Zbigniew Pilarczyk*, vicdekano de la Novfilologia Fakultato *Jerzy Kaliszan* kaj vicdirektoro de la Lingvistika Instituto *Jan Wawrzyniak*) esprimis sian aprecon pro la 10-jara ekzisto de la Interlingvistikaj Studoj kaj bondeziris por la simpozio. En tiu kadro okazis la konciza anglalingva prelego de *John Wells* (kun e-a prezentaĵo), la pollingva prelego de *Jerzy Bańczerowski*, eksdirektoro de la Lingvistika Instituto pri interlingvistiko kaj lingvistiko (kun e-a disdonaĵo). Fine *Ilona Koutny*, iniciatinto kaj gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj prezentis datumojn el la 10 jaroj de la Studoj (kun pola prezentaĵo).

La faka parto de la simpozio okazis en 7 *sinsekvaj sekcioj*, inter kiuj la unuaj 3 traktis lingvistikajn aspektojn ĵaŭde, vendrede okazis prelegoj en 2 kulturaj sekcioj antaŭtagmeze, movado kaj metodiko estis traktataj posttagmeze. Entute 32 prelegojn ni povis aŭskulti (de 32 prelegantoj el 15 landoj) kaj mallonge diskuti pri la starigitaj problemoj. La programo realiĝis laŭplane.

La **lingvistikaj prelegoj** prezentis vastan gamon da temoj: frazmelodion en Esperanto (*J. Wells*), elekton, klasifikon kaj kombinadon de morfemoj (*I. Bujdosó*, *K. Brosch*, *R. Rokicki*), vortkategoriojn (*B. Wacha*), problemojn de genroj (*M. Bavant*) kaj de personpronomo sistemo (*M. Farris*). Semantiko (*M. Duc Goninaz*) kaj frazeologio (*S. Fiedler*) same aperis en la programo.

*D. Blanke* klarigis, kiel informi en lingvistikaj medioj pri interlingvistiko, *B. Moon* raportis pri Esperanto kaj multlingvismo. *V. Barandovska* spuris virinojn aktivajn en lingvokreado. La prelego de *A. Melnikov* traktis lingvokulturologian aspekton.

La **kulturaj sekcioj** entenis prelegon pri la periodigo de e-literaturo de *T. Chmielik*, prezenton de virina poezio far *L. Ligeza*, glosaron de *Piĉ* far *J. Dörr*. *A. Sakaguchi* traktis realaĵojn el traduka vidpunkto, *N. Daniljuk* komparis la vortsimbolojn de la ukraina folkloro kun la esperantaj. La temaron vastigis prezento de la 50-jara historio de la Pola Radio far *B. Pietrzak*, la rolo de esperanto en muzeoj de *T. Nemere*. *Z. Kornicki* meditis pri la esenco kaj estonteco de e-kulturo. Ni povis aŭskulti problemojn de botanika terminaro de *A. Delmotte* kaj la komunikadproblemojn en EU far *H. Vogt*.

En la sekcio pri **movado** aperis temoj kiel informi eksterulojn pri esperanto de *J. Pietiläinen* kaj entute informi sen mitoj dank'al *Z. van Dijk*. *P. Balaž* informis nin pri la abundaj projektoj de E@I kaj *Z. Galor* skizis sociologiajn esplorojn pri la e-movado. *A. Korĵenkov* emfazis la aktualecon de zamenhofologio.

Lasta sekcio pri **metodiko** same vigligis la partoprenantojn per la prezento de Lingvolanĉilo far *A. Tellier*, la Komuna Eŭropa Referenckadro far *K. Kováts*. La propedeŭtikan valoron de e-o analizis *M. Nitkowska* kaj la tipajn erarojn de francoj en e-o *A. Jausions*.

Dum la fermo okazis disdono de atestiloj por la nunaj diplomiĝintoj de la Interlingvistikaj Studoj kaj por tiuj, kiuj finis la unujaran instruistan kurson realigatan en UAM kunlabore kun ILEI. Ĵaŭde vespere ĉiuj partoprenantoj kunvenis por la bele aranĝita bankedo. La ĉeestanta dekanino de la Novfilologia fakultato povis sperti aŭtentan esperantan etoson kaj interparoli kun kelkaj partoprenantoj. Vendrede vespere la semajnfina kultura aranĝo bonvenigis la konferencanojn per diskutrondo, prezento de la irana kulturo kaj multe da muziko....

### 3.4 En Zagrebo : Esperanto kaj kroata kultura identeco

En la Filozofia Fakultato de la Universitato de Zagreb la 7-an kaj 8-an de novembro 2008 okazis konferenco, organizita de la filozofia fakultato kaj Kroata Esperanto-Ligo. Ĝin preparis kaj gvidis pro. Velimir Piskorec. Oni prezentis jenan programon (laŭ la sekvo de prezentitaj prelegoj):

Josip Pleadin	<i>Historio de esperanto en Kroatio</i>
István Ertl	<i>La limoj de neŭtraleco, aŭ: Esperanto, ĉu nacie neŭtrala ilo por internacia komunikado?</i> (kroatigis: A. Jagnjić)
Zlatko Tišljar	<i>Eŭropaj valoroj</i>
Spomenka Štimec	<i>Tradukoj de la kroata literaturo per Esperanto al aliaj lingvoj</i>
Davor Klobučar	<i>Osijeka Kvinopo el 1889 – la unuaj esperantistoj en Kroatio</i>
Vjekoslav Morankić	<i>Historio de Esperanto-movado en urbo Rijeka</i>
Vlado Jurković	<i>Esperanto-elsendoj de Radio-Zagrebo 1953-1992</i>
Ivan Špoljarec	<i>PIF: kultura fenomeno – fenomena festivalo (40 jaroj ...spite al ĉio)</i>
Nikola Rašić	<i>Interlingvistikaj laboraĵoj de Tomo Maretić</i>
Kristian Novak	<i>Muzoj sub armiloj. Estetigo de milito en prelegoj de Mavro Špicer</i>
Eldi Grubišić-Pulišelić	<i>Malhelaj tipoj kaj serenaj vizaĝoj: Virino en tekstoj de Mavro Špicer</i>
Vinko Brešić	<i>Esperanta antologioj de kroata poezio de Mavro Špicer</i>

Andel Starčević/ Renata Geld

*Esperanto: kio ĝi estas kaj kiu bezonas ĝin?*

Velimir Piškorec, Aleksandra Ščukanec	<i>Kroataj Esperanto-lernolibroj</i>
Judita Rey-Hudeček	<i>Zagreba Metodo</i>
Ulrich Lins	<i>Ivo Lapenna</i> (kroatigis N. Rašić)
Josip Pleadin	<i>Kroata kulturo en la revuo „La Suda Stelo“</i>
Nikola Rašić	<i>Kontribuo de Dalibor Brozović al esperantologio kaj interlingvistiko</i>
Danijela Drakula	<i>Apliko de teorio de rezona agado en prognozo de engaĝiĝo por Esperanto</i>
Judita Rey-Hudeček	<i>Internacia Kultura Servo</i>
Jozo Marević	<i>Esperanto sur ŝpuroj de la latina</i>
Zlatko Hinšt	<i>Interlingvistika aliro al ekonomia terminologio kun speciala rerigardo al semantiko de nocioj</i>
Petar Radosavljević	<i>Esperanto i rumana kontrastive</i>
Radenko Milošević	<i>Per latina lingvo hieraŭ, per Esperanto hodiaŭ – en la engaĝiĝo por kroataj kulturo kaj lingvo</i>

## 4 Estontaj aranĝoj

### 4.1 Pri germana kaj romana lingvistikoj en Lesja Ukrainio

De 5-a ĝis 7-a de junio 2009 ĉe la Volinia Nacia Universitato Lesja Ukrainka en la urbo Lucjk okazos 2-a internacia konferenco (pri la unua vidu p.16-19), kiu traktos la temon „La prioritatoj de la nuntempa romana kaj germana lingvistikoj”. La konferencon patronos la Ministerio pri Klerigo kaj Scienco de Ukrainio. La konferencon organizos la Fakultato pri Romana kaj Germana filologioj.

La konferenco laboros en jenaj ĉefaj sekcioj:

- Diskursoscienco kaj tekstologio
- Etnolingvistiko. Lingvokulturologio
- Interlingvistiko
- Kognitiva lingvistiko
- Kontrasta lingvistiko. Lingva tipologio
- Leksika kaj gramatika semantiko
- Pragmatika studado de lingvaj unuoj
- Novaj tendencoj de leksikografio
- Sociolingvistiko
- Terminologio-scienco
- Teorio kaj praktiko de tradukado
- Funkcia karakterizo de diversgradaj lingvaj unuoj.

La aliĝilojn oni petas sendi ĝis la 1-a de aprilo 2009 (kun la indiko de la sekcio). La materialoj de la prelegoj estos publikigataj en la faka scienca revuo de Volinia Nacia Universitato “Naukovij visnik de Volinia Nacia Universitato nome de Lesja Ukrainka”, la serio “Filologiaj sciencoj” antaŭ la komenco de la konferenco. Unu paĝo kostas 15 hrivnoj (proksimume 3 EUR). La aliĝkotizo estas 100 hrivnoj (proksimume 15 EUR). Monon bonvolu sendi al Privatbank, konto 29243825521209, MFO 303440, ZKPO 13369965 por la karta konto 6762462034820099. Pri kostoj de la loĝado en la sporta resaniga bazo apud la fama kuraclago Svitjazj ni informos la dezirantojn aparte.

Informojn donas : Nina Daniljuk <nina\_daniljuk@ukr.net>

## 4.2 19-a konferenco de GIL

La 19-a konferenco de la germana scienca societo „Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL; Societo pri Interlingvistiko) okazos 20.-22. novembro 2009 en Berlino. La ĉefa temo de la konferenco, kiu realiĝos nur germanlinge, estas

*„La rolo de gravaj personoj en interlingvistiko“*

Informojn donas la prezidanto de GIL Detlev Blanke: [detlev@blanke-info.de](mailto:detlev@blanke-info.de).

## 5 Interlingvistiko en la universitato de Zagrebo

*Velimir Piškorec*

### Enkonduko

La Universitato de Zagrebo estas la plej granda kaj tradicirika universitato en Kroatio kun pli ol 55 mil studentoj. Ĝi konsistas el tridek fakultatoj kaj tri akademioj pri artoj, el kiuj la Filozofia fakultato kun siaj 25 fakoj estas unu el la plej grandaj unuoj de la Universitato kun ĉirkaŭ kvin mil studentoj. La plejmulto de studentoj ĉe Filozofia fakultato kombinas dum sia studado du studprogramojn. Ĉe la fakultato estos ofertitaj en la akademia jaro 2008/2009 eĉ 45 diversaj bakalaŭraj studprogramoj.

Dum la akademia jaro 2005/2006 okazis ampleksa kaj relative radikala studreformo laŭ Bolonjaj interkonsentoj – por la Filozofia fakultato tio praktike signifis, ke la ĝistiamaj kvarjaraj diplomaj studprogramoj estis anstataŭigitaj per du fazaj studprogramoj laŭ la modelo 3+2 aŭ escepte 4+1. Kutime la unua studperiodo ofertas ĝeneralajn konojn pri iu studobjekto kaj la dua specialiĝon kadre de la sama studobjekto. Ekzemple, la studentoj de germanaj studoj povas en sia dua, diploma studperiodo specialiĝi pri interkulturaj germanaj studoj, instruado de la germana aŭ tradukado kaj interpretado. En akademia jaro 2008/2009 komenciĝos la dua studperiodo laŭ tiu principo. Do, inter 2005 kaj 2008 paralele ekzistis du studsystemoj – la nereformita kaj la reformita. Ekde 2008/2009 ekzistos nur unu, la reformita studsystemo.

### Seminario pri eko- kaj interlingvistiko en 2007/2008

Laŭ la malnova studprogramo ĉiu studento de germanaj studoj en sia kvara studjaro devis enskribiĝi al unu lingvistika seminario. La oferto de seminarioj variis de jaro al jaro depende de la nombro de docentoj – kutime oni ofertis tri aŭ kvar seminariojn. Sed en la akademia jaro 2007/2008 la oferto de seminarioj estis pli riĉa, ĉar la Germana fakultato ricevis junajn geasistantojn (nomatajn en Kroatio sciencaj novicoj), al kiuj oni transdonis la pli ĝeneralajn kaj enkondukajn studobjektojn, kiujn antaŭe instruis pli maljunaj docentoj. Tiuj, inverse, kiel pli spertaj, povis dediĉi sin al ellaborado de specifaj seminarioj korespondaj al siaj fakaj interesoj.

Ĉar mi mem intertempe apartenas al pli maljunaj kunlaborantoj – kvankam la plej juna el ili – mi ricevis la eblecon gvidi eĉ du seminariojn. La seminarion pri lingvaj kontaktoj – ĝenerala teorio de lingvaj kontaktoj kaj german-kroataj lingvaj kaj kulturaj kontaktoj – mi jam ofertis dum kelkaj jaroj, sed oni petis min proponi ankaŭ iun ĝis tiam ne pritraktitan lingvistikan temaron.

Informiĝinta pri faka literaturo pri ekolingvistiko kaj antaŭ kelkaj jaroj kroatiginta du ĉapitrojn el la germana enkonduko al ekolingvistiko de la aŭstra lingvisto Alwin Fill, mi supozis, ke tiu

lingvistika disciplino estus oportuna kaj interesveka por miaj studentoj. Ekolingvistoj interalie pritraktas lingvan diversecon kaj aktive klerigas pri la bezono aktive protekti tiun diversecon. Aliflanke oni ankaŭ atentigas pri dominado de «grandaj» lingvoj kiuj «mangaças» malgrandajn lingvojn kaj pri la el tio rezultinta lingva malegaleco kadre de internacia komunikado.

En tiu punkto mi vidis ligilon al interlingvistiko, kiu el la perspektivo de neŭtrala internacia komunikado pritraktas pli-malpli similajn temojn. Nature kaj logike sekvis la ideo, ke por miaj studentoj estu bone konigi al ili jam 120 jarojn funkciantan Esperanton.

#### Nun mi skizu la lingvan profilon de miaj studentoj:

Preskaŭ ĉiuj el ili jam bone parolis la germanan kaj kutime la anglan. Krome, plejmulto el ili lernis en gimnazio la latinan kiel devigan studobjekton. Estis jam dirite, ke en la Filozofia fakultato kutime oni studas du fakojn – plej ofte du fremdlingvojn, sed ankaŭ unu fremdlingvon kombinitan kun humanismaj fakoj kiel historio, sociologio, pedagogio, etnologio, antropologio aŭ arkeologio. Tio konkrete signifas, ke miaj seminarianoj krom la gepatra kroata lingvo, la germana kaj la angla scipovis ankaŭ aliajn lingvojn: la latinan, la italan, la francan, la hispanan, la rusan kaj la slovenan. Do, miaj studentoj jam estis plurlingvanoj kiam ili komencis lerni Esperanton.

La antaŭscio de aliaj lingvoj ĉe miaj studentoj estis bonega bazo por kompara instrualiro rilate al etimologio de Esperanta vorttrezoro, sed ankaŭ al gramatiko. La ĉefa lernolibro uzata en la seminario estis la germanlingva eldono de la lernolibro kompilita surbaze de Zagreba Metodo (germanlingva, ĉar en Germana fako de Filozofia fakultato oni tradicie uzas la germanan kiel instrulingvon!). Uzataj estis ankaŭ ĉapitroj kaj ekzercoj el aliaj Esperanto-lernolibroj por plivastigado de vorttrezoro kaj gramatika ekzercado.

Mi koncentriĝis al instruado de Esperanto kaj ne al teoriumado pri interlingvistiko precipe pro la fakto, ke jam en aŭtuno 2007 mi sciis, ke ĝeneralaj interlingvistikaj temoj por miaj seminarianoj estos pritraktataj de la interlingvisto *Detlev Blanke* dum lia gastado en la Filozofia fakultato en majo 2008.

Nome, dum mia renkontiĝo kun Detlev Blanke en novembro 2007 mi informis lin pri mia intenco instrui interlingvistikon kaj Esperanton demandante lin ĉu li volus gastari en mia seminario pri eko-kaj interlingvistiko kaj paroli pri teorio kaj historio de planlingvoj kaj interlingvistiko. Li subtenis mian ideon kaj esprimis sian pretecon veni al Zagrebo. Do, mi decidis ne pritrakti mem tiujn temojn kiuj poste devis esti prezentotaj de li.

La sukcesplena gastado de Detlev Blanke estis okazigita en majo 2008. Jen esperantigitaj titoloj de liaj prelegoj en la germana:

1. Interlingvistiko – objekto kaj aktuala pozicio en la lingvoscienco
2. Internaciaj planlingvoj – karakterizo kaj tipologio
3. Vortfarado en Esperanto kaj la germana – kontrastive
4. Esperanto – internacia socilingvistika eksperimento. Kiel el projekto fariĝis lingvo (La detalan raporton pri tiu gastado vidu en Zagreba Esperantisto, 3/2008, p. 76-77).<sup>8</sup>

---

<sup>8</sup> Detlev Blanke restadis en Zagrebo de 18.-22. majo 2008 surpaze de kontrakto pri kunlaboro inter la universitato de Zagrebo kaj Humboldt-Universitato de Berlino, kie Blanke dum 20 jaroj prezentis kursojn pri interlingvistiko (prelegaroj). Krom la supre menciitajn prelegojn li ankaŭ prezentis pluan antaŭ la anoj de la „Klubo de sciencistoj kaj instruistoj de la Universitato de Zagrebo“ pri la temo „Lingvo desur la skribo-tablo? Defio por la lingvoscienco!“. Li krome prelegis pri sia restado en „Bona Espero“ antaŭ la zagreba Esperanto-klubo. Vidu la pli ampleksan germanan raporton de *prof. Velimir Piškorec* en „Interlinguistische Informationen“ 17 (2008), n-ro 68 (3/08): 34 – 36.



En mia seminario pri eko- kaj interlingvistiko gatis komence de majo 2008 ankaŭ anoj de Zagreba Studenta Esperanto-Klubo kiuj parolis al miaj studentoj pri siaj aktivecoj kaj eblecoj kiujn ofertas Esperanto por gejunuloj. La gastadoj de sinjoro Blanke kaj junaj zagrebaj esperantistoj ebligis al mi koncentriĝi al instruado de Esperanto kombinita kun seninterrompa diskutado pri etimologiaj aspektoj de Esperanto. Krome, la studentoj atingis ankaŭ bazajn konojn de Esperanto-gramatiko. Al instruado de Esperanto estis dediĉitaj entute sep instruesioj de la du-semestra seminario en aprilo kaj majo 2008 – nun mi iomete bedaŭras, ke mi ne reduktis teoriumadon pri ekolingvistiko al kosto de Esperanto-instruado, ĉar la studentoj montris grandan entuziasmon lernante Esperanton. Eĉ la fakto, ke la seminario okazadis lundon je la 8h00 ne malhelpis al ili partopreni relative multnombre. La Esperanto-instruadon ĉeestis kutime dek ĝis dekkvin studentoj.

La pozitivan reagon al Esperanto-instruado montras ankaŭ la fakto, ke tri seminarianoj kaj unu asistantino ankaŭ post la fino de prelegperiodo komence de junio 2008 volis daŭrigi la lernadon de Esperanto. Mi tre ekĝojis pro ilia entuziasmo kaj lernopreteco kaj ni regule renkontiĝis dum junio kaj komence de julio en mia oficejo unu fojon semajne po 90 minutoj. Ili esprimis deziron ankaŭ dum la sekvonta akademia jaro daŭrigi la lernadon. Kvankam tio estas aldona senpaga devigo por mi, mi esperas ke mi sukcesos inkludi tiun kurson en mian laborprogramon.

Priskribante la seminarion kaj la respektivan organizan kadron, mi devas ankaŭ mencii vere tre gravan fakton, ke la de mi proponita temaro por la seminario estis varme apogita de la estrino de Katedro por germana lingvo, *prof. d-rino Zrinjka Glovacki-Bernardi*, kiu kiel homo kaj kiel fakulino estas tre malferma por novaj ideoj. Ŝi mem estas elstara kroata lingvistino kiu okupiĝas pri tekstolingvistiko, socilingvistiko kaj lingvofilozofio. Pli frue, eĉ antaŭ nur kelkaj jaroj estus tute nekredeble, ke oni ofertu al studentoj de germanaj studoj pritrakti iun ajn temaron kiu ne rilatas rekte al la germana.

### **Seminarioj pri interlingvistiko kadre de reformitaj studprogramoj en 2008/2009**

La faka malfermeco kaj preteco de *profesorino Glovacki-Bernardi* apogi interlingvistikon kiel studobjekton kaj min kiel sian kunlaboranton, denove montriĝis komence de junio 2008, kiam Germana fako – same kiel ĉiuj aliaj fakoj en Filozofia fakultato – rajtis modifi sian reformitan studprogramon ĝis 20%. Dum niaj diskutoj pri eblaj modifoj, mi – rememorigante la gekolegojn pri bona reago de niaj studentoj al Esperanto-instruado kaj interlingvistikaj temoj prezentitaj dum la sukcesplenaj prelegoj de Detlev Blanke – proponis unusemestran elekteblan studobjekton por studentoj de germanaj studoj nomitan *Plansprachen* kaj simile strukturitan, kroatlingvan studobjekton sub la titolo *Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto*, elektebla de ĉiuj studentoj de Filozofia fakultato. Ambaŭ fakoj estus partopreneblaj de tiel nomataj antaŭdiplomaj, bakalaŭraj studentoj kadre de la studprogramoj reformitaj laŭ Bolonjaj interkonsentoj. Do, mia propono por instrui tiujn du studobjektojn estis unue formale akceptita de profesorino Glovacki-Bernardi kiel estrino de Katedro pri germana lingvo kaj poste ankaŭ dum la sesio de Germana fako en majo 2008. La 2an de julio 2008 ĝi estis fine aprobita de senato de Filozofia fakultato dum la sesio dediĉita al proponoj por modifoj de la ekzistantaj studprogramoj.

#### Jen la Esperantigita priskribo de la enhavo de interlingvistika seminario:

<i>La nomo de studobjekto:</i>	Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto
<i>Docento:</i>	Dr. sc. Velimir Piškorec, eksterordinara profesoro
<i>Poentoj:</i>	3
<i>Lingvo:</i>	la kroata
<i>Daŭro:</i>	unu semestro
<i>Statuso de la studobjekto:</i>	elektebla por ĉiuj studentoj de Filozofia fakultato

<i>Formo de instruado:</i>	1 instruhoro por prelego kaj 1 instruhoro por ekzercoj (entute 90 minutoj)
<i>Antaŭkondiĉoj por partopreni:</i>	la studentoj devis esti enkribitaj en iu ajn bakalaŭra studprogramo ĉe Filozofia fakultato
<i>Celo:</i>	akiro de scioj pri ĝeneralaj principoj de interlingvistiko kiel scienco pri planlingvoj kaj de historio de planlingvoj, iliaj sistemlingvistikaj aspektoj; akiro de bazaj konoj de strukturoj kaj elementoj de Esperanto kaj de baza komunika kompetenteco en Esperanto
<i>Metodoj:</i>	fronta instruado, grupa kaj individua plenumado de taskoj

*Enhavo:* Kadre de la studobjekto pritraktotaj estos diversaj aspektoj de planlingvoj kiel specifaj lingvosistemoj konstruitaj precipe por neŭtrala internacia komunikado. Diskutotaj estos klasifikoj de planlingvoj depende de ilia funkcio (filozofiaj lingvoj kaj tiuj por parola kaj skriba komunikado), lingva materialo el kiu ili konsistas (aprioraj kaj aposterioraj lingvoj) kaj rilate al la demando ĉu tiu materialo estis elprenita el unu aŭ pluraj lingvoj. Prezentotaj estos ankaŭ diversaj socikulturaj kunteksto, en kies kadro unuopaj planlingvoj aŭ planlingvaj projektoj estis konstruitaj. Oni analizos ankaŭ kriteriojn aplikitajn de unuopaj aŭtoroj de planlingvoj kaj motivojn laŭ kiuj ili orientiĝis. Skizotaj estos ĉefaj trajtoj de internacie uzitaj kaj uzataj planlingvoj (Volapuko, Esperanto, Ido) kaj de tiuj, kies aŭtoroj devenas el Kroatio (*Juraj Križanić: Ruski jezik, Juraj Bauer: Spelin*).

Speciale fokusota estos Esperanto kiel la plej sukcesinta planlingvo en la historio de la homaro, kiun karakterizas specifa lingva komunumo, 120-jara tradicio de uzado, plurfunkcieco kaj ampleksa korpuso de ĝeneralaj, literaturaj kaj fakaj tekstoj. Rilate tiun fakton, oni detale pritraktos gramatikajn, vortfaradajn kaj leksiko-semantikajn aspektojn de Esperanto. La ĉefa metodo estos kompara analizo de tiuj aspektoj kun lingvaj strukturoj kaj elementoj de lingvoj parolataj de seminarianoj, precipe de la gepatra kroata lingvo, sed ankaŭ de lingvoj uzataj en kroatia kultura kaj kleriga kunteksto, ekzemple la angla, la germana, la franca, la itala kaj la latina.

*Devoj de studentoj:* regula ĉeestado, skriba ekzameno meze de semestro kaj parola ekzameno fine de semestro.

## 6 Esperanto en universitatoj kaj institutoj de Ukrainio

*Nina Danylyuk*

### 1 Esperanto en bazaj lingvistikaj kursoj

Pri Esperanto kiel unu el la planlingvoj por internacia komunikado oni informas por studentoj-filologoj dum la instruado de la kursoj „Enkonduko al Lingvistiko” kaj „Ĝenerala Lingvistiko”. En la programo „Enkonduko al Lingvistiko”, kiun mi preparis kaj eldonis por studentoj, ricevontaj la fakon „ukraina lingvo kaj literaturo”, estas la temo „Lingvoj de la mondo kaj ilia klasifikado” (6 lekciaj horoj). Dum 2 lekciaj horoj mi rakontas pri la projektoj de internaciaj lingvoj kaj 2 aliajn mi speciale dediĉas al Esperanto. Post la leciono ni organizas renkontiĝon kun la membroj de Esperanto-klubo “Arbara kanto”, kies sidejo estas en la centra urba junulara biblioteko, por montri la “vivantecon” de la lingvo. Post tio ĉiam aperas dezirantoj studi la lingvon kaj ni komencas novan fakultativan Esperanto-kurson.

## 2 Esperanto en specialaj lingvistikaj kursoj

Mi preparis kaj eldonis la laboran programon de la speciala kurso “Internacia lingvo Esperanto sub la aspektoj de interlingvistiko kaj lingvokulturologio” por studentoj de filologia fakultato de Volinia nacia universitato. Tiu ĉi kurso donas teoriajn kaj praktikajn konojn pri nuntempaj problemoj de interlingvistiko kaj lingvokulturologio kaj internacia komunikado, kiuj aktualiĝas en la periodo de la globaliĝo, la funkciado de Eŭropa Unio kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj. La celo de la kurso estas prezenti ĉefajn konojn pri Esperanto en la kunteksto de interlingvistikaj kaj kulturologiaj studoj, konatigi kun la lingva sistemo de Esperanto kompare kun la ukraina kaj aliaj lingvoj (ĝermanaj, romanaj), kiujn studas la partoprenantoj.

## 3 Esperanto en fakultativaj kursoj

Fakultativajn kursojn oni komencas laŭ deziro de studentoj, se estas grupo de proksimume 10 personoj. Preskaŭ ĉiujare mi havas aldonan fakultativan kurson de Esperanto, kiu ne troviĝas en la studplano kaj estas senpaga por mi kaj por la studentoj. Similajn kursojn oni okazigas en Ternoila nacia pedagogia universitato kun la nomo de V.Hnatjuk, Odesa politeknika instituto, kelkfoje en Kijiva nacia universitato kun la nomo de T.Ŝevĉenko.

## 4 Esperanto en la sciencaj studentaj laboraĵoj

Al studentoj de filologia fakultato de Volinia universitato mi proponas la temojn por referaĵoj kaj por kursaj sciencesploraj laboraĵoj, ekzemple:

“Esperanto kaj Interlingvistiko”,

“La projektoj de internaciaj lingvoj ekde antikvaj tempoj ĝis la mezepoko”,

“La projektoj de internaciaj lingvoj en la XIX j.c.”,

“La projektoj de internaciaj lingvoj en la XX- XXI j.c.”,

“La historio de la naskiĝo de Esperanto. L.L. Zamenhof kiel kreinto de la lingvo”, “Esperanto-movado fine de la XIX – komence de la XX j.c.”,

“Esperanto-movado en la XX j.c. (ĝis la dua mondmilito)”,

“Esperanto-movado en la XX j.c. (post la dua mondmilito)”,

“Beletra, scienca esperantlingva literaturo, lerniloj, periodaĵoj en Esperanto”,

“Internaciaj kaj ukrainiaj Esperanto-organizaĵoj”,

“Lingva strukturo de Esperanto”.

## 5 Esperanto dum sciencaj konferencoj

En Ukrainio dum lastaj jaroj okazis 2 gravaj internaciaj sciencaj konferencoj, kie temis pri Esperanto.

(1) La internacia scienca konferenco “Esperanto en la XXI jarcento: la stato kaj perspektivoj omaĝe al la 100-jara datreveno de la Esperanta lernolibro por ukrainoj de Miĥajlo Jurkiv” okazis la 29-30.06.07 en la Ternopila nacia pedagogia universitato nome de V. Hnatjuk. Ĝin organizis Ternopila urba Esperanto-klubo “Spinofloro”, Filantropa fondaĵo nome de Vasil Jeroŝenko „Espero”, Ukraina Esperanto-Asocio (UkrEA) kaj instruistoj de la universitato.

La unua ukrainlingva Esperanto-lernolibro, kiu aperis en la 1907 jaro, fakte, estas la simbolo de aliĝo de ukrainoj al atingoj de la tutmonda interlingvistika penso. La raraĵo estis reeldonita okaze de la jubileo pere de *N. Voloŝin*. En la prelegoj oni substrekis la historian signifon de la unua lernolibro kaj de la dua lernolibro de *O. Kuzjma* (1922 j.) por la nacia kaj kultura renesanso en Ukrainio, kies partoj apartenis al Aŭstro-Hungara kaj Rusa imperioj komence de la XX j.c. (*I.*

*Halajčuk, D. Bučko*). Tre bone estis montrita la rolo de la tradukitaj verkoj de *T. Ševčenko*, la fabeloj kaj legendoj de *V. Jeroŝenko (Eroŝenko)*, la popolaj kantoj, la ukraina Esperanto-periodaĵo por konatigi la mondon de Esperanto kun la riĉa ukraina kulturo (*V. Pacjurko, E. Kovtonjuk, P. Ŝimkiv*). *T. Popova* kaj *V. Pogorecĵka* konvinke parolis pri la efika uzado de Esperanto en la branĉo de la turismo, *M. Rostocĵka* – pri perspektivoj de Esperanto en Eŭropa Unio kaj internaciaj rilatoj. La demandojn de la evoluo de Esperanto kaj la ukraina lingvo pritraktis *N. Daniljuk, L. Struhanecj, I. Koĉan, O. Huzar*. Pri riĉa historio de Ternopila Esperanto-klubo (1907-2007 j.) interese rakontis *R. Roman*, pri Esperanto-fondoj en Ternopila regionografia muzeo – la direktoro *S. Kosjuk*. La scienca kaj organiza nivelo estis sufiĉe alta (partoprenis 4 doktoroj de sciencoj, 4 kandidatoj de sciencoj, interesatoj el Ternopil, Kijiv, Lviv, Pustomiti, Ivano-Frankivsĵk, Odesa, Lucĵk). Ankaŭ gravis, ke estis aliĝintaj aŭtoritatoj el eksteresperanta scienca medio. Estis eldonitaj materialoj en la ukraina lingvo kaj Esperanto. Fine de la konferenco estis akceptita rezolucio kun rekomendoj pri disvolvigo de Esperanto en Ukrainio. La partoprenantoj esprimis deziron, ke similaj konferencoj estu periodaj en superaj kaj mezlernejoj de Ukrainio.

(2) La internacia scienca konferenco „Interagado de etnaj kaj planitaj lingvoj en la kunteksto de la eŭropa integriĝo“ okazis la 10-12.04.08 en la Volinia nacia universitato nome de Leŝja Ukrainka (urbo Lucĵk, Ukrainio) kaj estis dediĉita al la Internacia Jaro de Lingvoj. (Vidu la raporton sur p. 16-19)

## 6 Esperanto dum la publikaj lecionoj kaj renkontiĝoj kun Esperanto-fakuloj

Tre gravaj por disvastigo de informo pri Esperanto kiel lingvo taŭga por scienca, komerca k.a. laboro, estas renkontiĝoj kun Esperanto-fakuloj. Lastatempe en la Volinia nacia universitato la 4.-5.10.07 okazis la publika prelego en Esperanto de la kontrolo-revizia administranto pri financoj de Konsilio de EU *P.Branko* kaj “ronda tablo” kun partopreno de ĵurnalistoj (interpretis *N. Daniljuk*). La 24.10.07 en la Instituto de filologio de la Kijiva nacia universitato de *T. Ševčenko* okazis renkontiĝo kun studentoj de la fako de fremdaj lingvoj, dediĉita al Esperanto (*V. Hordijenko, P.Branko*). La 27.10.07 en la Kijiva lingvistika gimnazio № 32 okazis publika leciono pri la lingvoj en Eŭropo (*E. Kovtonjuk, S. Fedotova, P. Branko*). Okazis renkontiĝoj kun *M. Kirsch*, estro de la germana firmao “AU-Pair-Kontakt”, kiu uzas Esperanton kiel laborlingvon en jenaj lokoj: 14.05.08 en la Ternopila nacia pedagogia universitato, 16.05.08 en Lviva nacia universitato en la fakultato de romana kaj germana filologioj kaj 21.05.08 en la Volinia nacia universitato en la fakultato de internaciaj rilatoj. Ĉiuj renkontiĝoj havis bonajn sukcesojn.

Do, Esperanto en ukrainiaj universitatoj kaj institutoj estas prezentata diversmaniere. Bedaŭrinde, ni ne havas Esperanton en la studplanoj de la Ministerio pri klerigo kaj edukado de Ukrainio kiel devigan studobjekton, sed ukrainaj instruistoj uzas multajn eblecojn por disvastigi la lingvon.

*(Nina Danylyuk estas docentino de la Volinia nacia universitato, sekciestro de ILEI).*

---

**Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org). Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 633, fakso:+ 49-30-54 98 16 38, [detlev@blanke-info.de](mailto:detlev@blanke-info.de). Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retroŝto aŭ sur diskedo/KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro. Kunlaborantoj el ĉiuj regionoj de la mondo bonvenas. ISSN 1385-2191.**

---